

EL POPOLA ĈINIO

中國報

4

1975



Ŝivan-aj Fajencaĵoj de Guangdong- Provinco



Kanto pri la nova socialisma vivo



Milicaneto



Ĝojo pro vidita riĉa rikolto

Reprezentantoj de la Kvara Tutlanda Popola Kongreso inter Popolamaso

Laboristodevena Ĝou Ĝan-aŭ (dekstre), konstanta membro de la partia komitato de Daking-olekampo, ofte partoprenas en kolektiva produktado kaj direktas laboron.





Guo Fenglian (la kvara de dekstre), sekretario de la partia filio de Daĝaj-brigado, studas kune kun la brigada teoria grupo.

Li Kinglin (la tria de dekstre), vicestro de la revolucia komitato de la elementa lernejo Dongfanghong, Putian-gubernio, Fugian-provinco, parolas al lernantoj pri grava signifo de la kombiniĝo de intelektaj junuloj kun laboristoj kaj kamparanoj.





Matematikisto Hua Luogeng (la unua de dekstre) interparolas kun laboristoj pri la rapida metodo de serĉado de plej bona plano en la Nanning-a Mantraktora Fabriko.


Labormodelo Hu Ĉanghaj, konstanta membro de la partia komitato de Kajluan-karbominejo, petas de ministroj opiniojn pri bonigo de gvida laboro.

Jang Jucaj (la unua de dekstre), vicdivizioestro de iu trupo de ĈPLA kaj unuaklasa batala heroo, nun direktas soldatojn en milita trejnado.






92-jara uigura malriĉkamarano Kuerpan Tulumu (la dua de maldekstre) de Jutian-gubernio de Hingiang ofte edukas gejunulojn per komparo de la nova socio kun la malnova.





Kampano-agronomo Jaŭ Ŝiĉang (maldekstre), sekretario de la ĝenerala partia filio de Tuangie-brigado, Nanvang-komunumo, Penglaj-gubernio, Ŝandong-provinco, resumas sperton kune kun veterana kampano kaj intelekta junulino pri la sperto kiel pliprodukti arakidon.

Tajvan-ano Ĝang Gujĝu, laboristino de la Dua Teksa Fabriko de Hiamen, Fugian, vizitas tajvan-anojn laborantajn en la urbo.





An Guanjun (la unua de dekstre), vicsekretario de la partia filio de Diangu-brigado, Huangĝuang-komunumo, Baŭdi-gubernio, Tiangin, varme zorgas pri la kreskado de intelektaj gejunuloj.

Daj-o Ĵujban (la dua de maldekstre), estro de Guangŝuang-brigado, Ĵujli-gubernio, Junnan-provinco, intime interparolas kun komunumanoj.





Intelekta junulino Ĝaǔ Danping (maldekstre fronte), kiu fiksloĝiĝis en Anhi-gubernio, Gansu-provinco, estis promociita kiel vicsekretario de la gubernia partia komitato, pro sia modesteco en ricevo de re-duko de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj kontribuo farita por konstrui novan socialisman kamparon.

Instruisto Liu Guoĝong (la dua de maldekstre) de la Sesdeka Mezlernejo de Kantono, ĉina elmigrinto reveninta al la patrolando, lernas kune kun aliaj instruistoj.



Venke Marŝu Antaŭen laŭ la Revolucia Linio de Prezidanto Maŭ

LA vastaj amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj la aliaj popoloj de la tuta lando varme akklamis venkan kunvokon de la Dua Plena Sesio de la Deko Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj la Unua Sesio de la Kvara Tutlanda Popola Kongreso de la Ĉina Popola Respubliko. Ili decidis, sub la gvidado de la Centra Komitato de la Partio kun Prezidanto Maŭ kiel ĉefo, pli kompakte unuiĝi, persisti en la fundamenta linio de la Partio, serioze efektiviĝi novan konstitucion kaj energie plenumi diversajn batalajn taskojn elmetitajn de la Kvara Tutlanda Popola Kongreso, plifirmigi kaj plifortigi la diktaturon de la proletaro por gajni novajn venkojn de la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado. Ĉisube ni publikigu la paroladojn de laboristo, kamparano, soldato, revolucia kadro kaj revolucia intelektulo.

Goŭ Ginhua, maljuna laboristo de haveno Hingang, Tiangin, diris:

Informiĝinte pri triumfa fermiĝo de la Unua Sesio de la Kvara Tutlanda Popola Kongreso havanta historian signifon, ni laboristoj multe ekscitiĝis kaj varme akklamis grandan venkon de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ.

La nova konstitucio montras: “La Ĉina Popola Respubliko estas socialisma ŝtato de la diktaturo de la proletaro, gvidata de la laborista klaso kaj bazita sur la alianco de laboristoj kaj kamparanoj.” En nia socialisma lando laborista klaso fariĝis gvida klaso kaj mastro de la ŝtato. La laboristoj-, kamparanoj- kaj soldatoj-reprezentantoj konsistigis 72% de la 2,864 reprezentantoj ĉeestintaj la Kongreson. Tio plene pruvis, ke en nia socialisma lando la laborantaj popoloj estas mastroj de la ŝtato, ili ne nur laboras por konstrui socialismon, sed ankaŭ administras la ŝtatajn aferojn. Kompare kun la tragedia travivaĵo de la laborista klaso en la malnova socio, la hodiaŭo estas vere kvazaŭ paradizo.

Mi eklaboris sur doko jam de mia infanaĝo. En la malnova socio belaj riveroj kaj montoj de nia patrolando estis terure tretitaj de imperiismo kaj Kuomintanga reakciularo. Ni prenu la havenon de Tiangin kiel ekzemplon. Antaŭvespere de la Liberiĝo, ĝia naviga vojo estis preskaŭ ŝtopita pro longtempa nedragado, kaj nur malgrandaj barĝoj povis atingi ĝin. Tiam dokistoj estis de neniu zorgataj kaj baraktis inter vivo kaj morto. Eksonis printempa tondro. Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio savis nin el mizero, kaj ni dokistoj fariĝis mastroj

de la ŝtato. Sub la gvidado de la Partio, disvolvante revolucionan spiriton de sinapogo sur propraj fortoj kaj penema lukto en malfaciloj, ni laboristaro plivastigis kaj konstruis dokojn, tiel ke multe ŝanĝiĝis la fizionomio de la haveno Hingang. Hodiaŭ, en la socialisma haveno regas prospereco kaj dek-mil-tonelaj ŝipoj libere frekventas. Nun la haveno jam fariĝis unu el la gravaj havenoj en la nordo de Ĉinio.

Tiu, kiu spertis frostan vintron, pli bone sentas varmon de la suno; maljunaj laboristoj devenintaj de la malnova socio plej ŝatas la socialisman sistemon. Dum la lastaj pli ol 20 jaroj, en nia granda socialisma patrolando okazis giganta ŝanĝiĝo. Sub la gvido de la Partio, la laborista klaso aktive disvolvis la tri grandajn revoluciajn movadojn de klasbatalo, produkta batalo kaj scienca eksperimento, plene movis sian saĝon

kaj talenton kaj kreis multajn miraklojn en niaj industrio, agrikulturo kaj aliaj frontoj. Nia granda socialisma patrolando prosperas tagon post tago. En la jaro 1968, mi ordinara laboristo venis al Pekino por partopreni en celebrado de la nacia festo komisiite de laboristoj de la tuta haveno kaj feliĉe vidis la grandan gvidanton Prezidanton Maŭ. Tio estis neimagebla en la malnova Ĉinio. Kiel mastro de la ŝtato, ni laborista klaso nepre respondos la batalan alvokon elmetitan de la Kongreso, firme memoros la fundamentan linion de la Partio, serioze legos verkojn de Marks, Engels, Lenin, Stalin kaj Prezidanto Maŭ, daŭre kritikos Lin Biaŭ kaj Konfucion, efektivigos la principojn de teno de revolucio, stimulo de produkto, aliaj laboroj kaj preparo kontraŭ milito, streĉante plene la energion kaj strebante forte antaŭen por fari pli grandajn kontribuojn por la socialisma patrolando.

Ŝtalistoj de la Ĉefurba Ferŝtala Kompanio legas dokumentojn pri la Kvara Tutlanda Popola Kongreso.



Vang Jukun, kadro de Nanvangĝuang-brigado de Anping-gubernio, Hebej-provinco, diris:

En la ĝojindaj tagoj, ni tre ekscitiĝas, kiam ni retrorigardas la grandajn sukcesojn akiritajn de la popolo de nia lando en la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado kaj la grandegajn ŝanĝiĝojn de nia Nanvangĝuang en la lastaj pli ol 20 jaroj. En la pasinteco en nia brigado ĉie regis dezerteco. Nun, bruas agrikulturaj maŝinoj, staras en vicoj verdaj arbaroj, pendas en ĝardenoj sukoriĉaj fruktoj kaj montas grenoj kaj kotono sur draŝejoj. Ĉiuj niaj familioj havas ne nur sufiĉajn grenon kaj vestaĵojn, sed ankaŭ brilajn elektrolampojn. Precipe tra la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj la Movado de Kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio, tute noviĝis la spirita fizionomio de vastaj amasoj de kadroj kaj komunumanoj, kaj senprecedence plialtiĝis ilia konscio pri daŭra revolucio kaj aktiveco en konstruo de socialismo. Ĉion ĉi tion oni ŝuldas al la direkto de la fundamenta linio de la Partio.

Dum la pli ol 20 jaroj, la kadroj kaj amasoj de nia Nanvangĝuang ĉiam memoris la fundamentan linion de la Partio, firme iris la socialisman vojon kaj persistis en batalo kontraŭ restarigo kaj regreso. Tra bataloj kontraŭ klasaj malamikoj kaj reviziismaj linioj ni akiris venkojn unu post alia kaj la socialisma pozicio senĉese solidiĝas kaj la kolektiva ekonomio pli kaj pli fortiĝas. Kaj la batalo kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio ankoraŭ profunde kompreniĝis al ni ke por persisti en la socialisma direkto oni batalas ne nur kun klasaj malamikoj kaj kun reviziismaj linioj, sed ankaŭ kun ideologio de reakciaj dekadencaj klasoj. Sub la aktiva gvido de la partifilio de nia brigado, la kadroj kaj amasoj forte kritikis reakciajn doktrinojn de Konfucio kaj Mencio kaj plialtiĝis per tio la konscion pri la bataloj inter la du klasoj kaj la du linioj kaj firmiĝis sian decidon iri la socialisman vojon. Kun senĉesa profundigo de la revolucio, la produkto leviĝis jaron post jaro. En

la pasinta jaro la meznombra pomua produktokvanto de greno de la tuta brigado atingis pli ol 600 kilogramojn.

Fera fakto pruvis, ke estas socialismo kiu direktas nin malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn al brila perspektivo kaj estas socialisma vojo kiu kondukas nin al venko.

Ĝang Fengjun, aviadistino de iu trupo de aerarmeo, diris:

En la lastaj tagoj, mi estas senkompare emociita. En la malnova socio ni virinoj vivis en la socia fundo. Estas la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, kiu gvidis la ĉinan popolon en renversado de la tri grandaj montoj — imperiismo, feŭdismo kaj burokrata kapitalismo, savis nin el mizera abismo, kaj tiel ni fariĝis mastroj de la ŝtato. La epoko ŝanĝiĝis, kaj la viroj kaj la virinoj ĉiuj estas egalaj. Pli ol 22% de la reprezentantoj de tiu ĉi Kongreso estis virinoj, iuj el ili eĉ estis elektitaj kaj nomumitaj kiel ŝtataj gvidaj laborantoj. Ni profunde komprenas ke sen gvido de la Komunista Partio kaj Prezidanto Maŭ, kaj sen nova socialisma Ĉinio de diktaturo de la proletaro, ne estus hodiaŭa feliĉa vivo de ni virinoj.

Sub nutrado de Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso, ni aviadistinoj rapide kreskas. Estas la Partio kaj Prezidanto Maŭ kiuj donis al ni flugilojn, kaj estas la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, kiu direktas nin en aviadado. Je la 8-a de marto, 1952, la unuaj aviadistinoj de la nova Ĉinio stirante batalaglojn flugis super Tian-anmen-pordego kaj glorie ricevis la revuon de Prezidanto Maŭ. Dum la pli ol 20 jaroj, ni aviadistinoj nin hardis en batalado, senĉese levis niajn politikan konscion kaj militan teknikon kaj faris kontribuojn al la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado. Ni iam helpis trosekajn lokojn per faligo de arta pluvo, ĵetis urĝe bezonatajn materialojn al amasoj suferantaj katastrofon, transportis vivdan-

ĝerajn klasajn fratojn, disŝprucigis insekticidon sur malsanajn grenplantojn, kontribuis al scienca eksperimentado kaj multfoje partoprenis en taktika ter-mar-aera ekzerco.

En la Granda Proleta Kultura Revolucio, precipe en la Movado de Kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio, ni serioze studas Marksismo-Leninismon, forte kritikis reaktan konfucianismon kaj burĝan militan linion de Lin Biaŭ. Dank' al tio senĉese altiĝis la konscioj pri batalo inter la du klasoj kaj la du linioj kaj pri daŭra revolucio. Ĉio ĉi tio pruvas, ke ĉiun nian progreson ni dankas al la direktado de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ.

Ni firme respondos solenan alvokon de la Kongreso, ĉiamaniere plenumos ĉiujn batalajn taskojn elmetitajn de la Kongreso, estos ĉiam pretaj por firme, ĝisfunde kaj tute ekstermi invadontajn malamikojn kaj flugos por ĉiam sur la fluglinio montrita de Prezidanto Maŭ.

Avazihan (ĥalĥazo) diris:

Prezidanto Maŭ diris: **“La unuiĝo de**

la lando, la solidareco de la popolo kaj la solidareco de niaj diversaj naciecoj — jen estas la fundamentaj garantioj por la nepra triumfo de nia afero.” Laŭ la brila instrukcio de Prezidanto Maŭ la nova konstitucio plene enkorpiĝas la penson de nacia unuiĝo kaj nacia egaleco, koncentre spegulas la komunan volon de diversnaciecaj popoloj kaj tute konformas al iliaj radikalaj intereso plifortigi la diktaturon de la proletaro, konstrui socialismon, preventi kapitalisman restaŭron kaj oponi kontraŭ agresado kaj renversado fare de eksteraj landoj. Nia lando havas 54 minoritatojn kun kelkdek milionoj da homoj, kiuj estas unu el la gravaj fortoj en la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado de nia lando. La nova konstitucio klare difinas: “aktive subteni la minoritatajn naciecojn en la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado”, tio plene montris zorgadon de la Partio kaj Prezidanto Maŭ al ni minoritatoj.

La nacia unuiĝo kaj nacia egaleco de la nova Ĉinio efektiviĝis sub la saĝa gvido de la Komunista Partio de Ĉinio kun Prezidan-



Kadroj kaj komunistoj de Ŝijue-brigado de Ŝijue-komunumo, Nankino, legas Novaj-komunikon de la Unua Sesio de la Kvara Tutlanda Popola Kongreso sur la konstruejo por akvotutiligo.



Komandantoj kaj batalantoj de iu kompanio de la Pekina Trupo de ĈPLA decidis respondi la alvokon de la Kvara Tutlanda Popola Kongreso kaj konduki la movadon de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio ĝis la fino.

to Maŭ kiel ĉefo. La nacia politiko de la Partio ebligas al niaj diversaj frataj naciecoj ĝui vastan aŭtonoman rajton, veran egalecon en politiko, ekonomio kaj kulturo kaj respekton en lingvoj parola kaj skriba, moroj kaj kutimoj. La nacia politiko de la Partio multege vekis ĉe la diversnaciecaj popolanoj socialisman aktivecon kaj rapidigis disvolvigon de minoritataj regionoj. Post la Liberiĝo giganta ŝanĝiĝo okazis al nia ĥalĥaza paŝta regiono. Paŝtistoj suriris la oran socialisman vojon; brutoj de popolaj komunumoj oble plimultiĝas; en multaj paŝtaj regionoj oni jam atingis memsufiĉon en greno; sur Pamiro-altebenaĵo, kiu antaŭe havis neniun industrion, nun jam stariĝis multaj fabrikoj; paŝtistoj, kiuj estis kovritaj de ĉifona ŝaffelo de generacioj, jam vestis sin per kotonŝtofaj, silkaj kaj lanaj vestoj; en iuj lokoj, kiuj antaŭe ne havis eĉ unu elementan lernejon, nun jam populariĝis eduko de elementa lernejo kaj stariĝis mezlernejo; kaj gejunuloj unuj post aliaj vizitas universitatojn post la granda kultura revolucio... Mi, filino de malriĉpaŝtisto laborinta kiel bruto en la pasinteco, ne nur havis ŝancon

viziti universitaton, sed ankaŭ estis glorie elektita kiel reprezentanto de la Deko Tutlanda Kongreso de la Partio. Tio estis neniel sonĝebla en la pasinteco. Ni ĥalĥaza popolo profunde komprenas, ke nur feltita ŝaflano ne povas esti disblovita kaj povas rezisti kontraŭ vento kaj frostoj; nur unuiginte ĉirkaŭ la Partio kaj Prezidanto Maŭ la diversnaciecaj popoloj povas prosperi, fortiĝi kaj ĉiam antaŭenmarŝi. Ni ĥalĥaza popolo firme respondos la alvokon elmetitan de la nova konstitucio, ke "popolo de ĉiuj naciecoj de la tuta lando, unuigu por gajni ankoraŭ pli grandajn venkojn", kaj ĉiam antaŭen marŝos laŭ la vojo montrita de Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso!

Vu Venzaŭ, profesoro de la Centra Instituto por Nacimalplimulto, diris:

La Kongreso estis okazigita en la tempo, kiam la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado de nia lando gajnis brilajn sukcesojn, precipe la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj la Movado de Kritiko kon-

traŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio akiris grandajn venkojn kaj kiam la situacio en- kaj eksterlanda estas bonega. Tiu Kongreso estis kunveno de unuiĝo, kunveno de venko. Kontrastante kun ekonomia tumulto kaj inflacio de la kapitalisma mondo, la en- kaj el-spezoj de nia lando tenas sin ekvilibras, ni havas nek enlandajn nek eksterlandajn ŝuldojn, la prezoj estas stabilaj, la popola vivo pliboniĝas paŝon post paŝo, kaj la socialisma konstruado prospere disvolviĝas tagon post tago. Ja vere du malsamaj mondoj estas! Kiel ni devenintaj de la malluma malnova socio povas ne ekscitiĝi kaj ĝoji? Ni decidis plenumi ĉiujn batalajn taskojn elmetitajn de la Kongreso.

La Kvara Tutlanda Popola Kongreso havis plej vastan reprezentecon. Laboristoj-, kamparanoj- kaj soldatoj-representantoj konsistigis 72% de la reprezentantoj, kaj la virinoj-representantoj — pli ol 22%. Niaj 54 minoritataj naciecoj ĉiuj havis siajn reprezentantojn en la Kongreso. La Kongreson ĉeestis ankaŭ 12 reprezentantoj kiuj estas niaj samlandanoj de Tajvan-provinca origino. Multaj el la reprezentantoj estas progresintaj elementoj, amase aperintaj en

la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj la Movado de Kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio, viklecaj sturmantoj de diversaj frontoj kaj daŭrigantoj de la proleta revolucia afero. Krome, inter la reprezentantoj troviĝis ankaŭ la reprezentantoj de ĉiuj patriotaj demokratiaj partioj kaj patriotaj personoj. La konsisto de la Kongreso plene manifestis la pluapaŝan disvolviĝon de la revolucia unueca fronto, gvidata de la laborista klaso kaj bazita sur la alianco de laboristoj kaj kamparanoj, spegulis la fortiĝon de granda revolucia unuiĝo de diversnaciecaj popoloj.

En sia “Raporto pri la Laboro de la Registaro” Ĉefministro Ĝou faris alvokon: Antaŭ la fino de la kuranta jarcento, ni devas konstrui nian landon en potencon modernan socialisman landon. Tio multe kuraĝigis min. Mi kiel intelektulo el la malnova socio estas profunde venenita de burĝa ideologio. Mi decidis lerni de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, akcepti ilian reedukon, energie reformi mian mondkoncepton por kontribui mian forton al konstruado de potenca moderna socialisma lando.



Karbistoj de la Hin-giang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono aŭskultas la ĝojigan informon pri okazigo de la Kvara Tutlanda Popola Kongreso.

Prospera Disvolviĝo de Agrikultura Mekanikigo en la Nova Ĉinio


EN la vasta kamparo de Ĉinio, ĉu en ebenaĵoj kaj montaroj, aŭ en arbaraj regionoj, stepoj kaj marbordoj, pli kaj pli leviĝas la mekanikigo en produktado.

Sur la vastaj nordaj ebenaĵoj oni jam komencis uzi traktorojn kaj rikoltomaŝinojn en grandaj areoj: en sudaj rizproduktaj regionoj rizidplantiloj, draŝmaŝinoj kaj aliaj rizkampaj mekanikaj aparatoj estas ĝenerale vastigataj. Aplikado de maŝinoj por terforpuŝo, grundebenigo, ŝovelado kaj kanalfosado en agrikulturo rapidigis la agrikulturan fundamentan konstruadon. Kaj la grandnombra multigo de drenaj kaj irigaciaj maŝinoj kaj la grandskala disvolviĝo de akvomastroma konstruado ebligis al du kvinonoj de la agroj de Ĉinio riĉan rikolton tiel en sekeco kiel en pluvabundo. La disvolviĝo de agrikultura mekanikigo provizis gravajn kondiĉojn en materio kaj tekniko por senĉesa disvolviĝado de la agrikultura produkto en Ĉinio, kaj plie solidigas kaj disvolvas la kolektivajn ekonomion de popolaj komunumoj.

En la malnova Ĉinio antaŭ la Liberiĝo, sub la kateno de reakcia feŭda-bienula

sistemo, agrikultura produkto estis tre postiginta kaj preskaŭ ĉiuj laboroj estis farataj per la mano. En nacimalplimultaj regionoj ĉe malproksimaj landlimaj regionoj, iuj vivis nomade por paŝti ĉe akvoj kaj herbejoj kaj aliaj eĉ troviĝis en stato de primitiva produktado plugante per tranĉiloj kaj semante post bruligoj.

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, oni faris agraran reformon, abolis la feŭdan ekspluatan posedsystemon de la tero kaj liberigis produktajn fortojn. Dank' al tio la agrikultura produkto atingis rapidan restariĝon kaj disvolviĝon. Sed, tiam la agrikulturo ankoraŭ restis en etprodukta ekonomio, konsistanta el disaj individuoj, kiuj posedis nur malgrandajn dislokitajn parcelojn, kaj al ili ne eblis aĉeti agrikulturajn mekanikaĵojn por entrepreni agrikulturan bazan konstruadon. Sub tiaj kondiĉoj ne estis uzeblaj agrikulturaj maŝinoj, eĉ se ili tiajn havus. Post la agrara reformo, troviĝis du malsamaj vojoj en la ĉina kamparo por disvolvi modernan grandskalan agrikulturon: unu estis socialisma vojo organizi la kamparanojn por disvolvi la produkton kaj efektiviĝi mekanikigon per la kolektivaj fortoj; alia estis kapitalisma



Mantraktoroj produktitaj de la Ŝaŭguan-a Traktora Fabriko de Guangdong

vojo permesi liberan disvolviĝon de kampara ekonomio.

En la ŝlosila momento de batalado inter la du vojoj, la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ Zedong saĝe montris: “**Sub la kondiĉoj en nia lando, necesas unue kooperigi la agrikulturon por ke oni poste povu uzi grandajn maŝinojn en ĝi (ne kiel en la kapitalismaj landoj, kie oni kapitalismigas la agrikulturon).**” Tio signifas, ke la vojo por disvolvi la agrikulturon de Ĉinio estas: unue praktiki agrikulturan kolektivigon, kaj poste, surbaze de kolektivigo, paŝo post paŝo efektiviĝi la mekanikigon kaj elektrigon de la agrikulturo. Responde al la alvoko de Prezidanto Maŭ kun ardanta fervoro, la vasta kamparanaro varme levis tajdon de agrikultura kooperigo. En la jaro 1958, en la kamparo de Ĉinio, oni

plie fondis popolajn komunumojn sur bazo de agrikulturaj kooperativoj. La supereco de la popola komunumo multe akcelis produktan disvolviĝon kaj pluapasa fortigis la kolektivan ekonomion kaj samtempe liveris ekstreme favorajn kondiĉojn por disvolvi agrikulturan mekanikigon.

Vidante la bonegan situacion rapide disvolviĝantan post la agrikultura kolektivigo en Ĉinio Prezidanto Maŭ Zedong ree faris ĝustatempan instrukcion: “**La fundamenta elirejo de agrikulturo estas mekanikigo.**” En diversaj lokoj de la lando tuj leviĝis amasa movado de agrikulturila reformado kaj rapide stariĝis nombro da entreprenoj por fabriki kaj ripari agrikulturajn maŝinojn kaj instrumentojn, kiuj komencis pogrande produkti grandajn kaj mezgrandajn traktorojn.

Sed, la vojo ne estas ebena. La revolucia linio de Prezidanto Maŭ renkontis la oponon de Liu Ŝaŭki, kiu tiam ankoraŭ okupis gravan postenon de la ŝtato, kaj liaj kunuloj. Ili komence propagandis pri “unue mekanikigo kaj poste kooperativigo” por subpremi la entreprenadon de kooperado de la kamparanoj kaj oponi la fondadon de popolaj komunumoj. Post efektiviĝo de agrikultura kolektivigo, kiam la amasoj tutforte reformis agrikulturilojn kaj fondis multe da fabrikoj servantaj al la agrikulturo en diversaj lokoj de la lando, ili denove dissemis la absurdajn tezojn: “Ĉinio ne bezonas mekanikigon pro abundo de homoj kaj malmulteco de tero.” “Ne eblas mekanikigi la detalajn kaj delikatajn fleglaborojn sur la kampoj” ktp. En la komenco de sesdekaj jaroj, profitante ke la nacia ekonomio de nia lando trafis provizorajn malfacilojn, ili grande dehakis agrikulturan mekanikan industrion, kio prokrastis agrikulturan mekanikigon de Ĉinio.

En la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj en la movado de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio, la vastaj membraroj de popolaj komunumoj kritikis la reviziisman linion antaŭenpuŝitan de Liu Ŝaŭki kaj

Lin Biaŭ, profunde disvolvis la amasan movadon de “lerno de Daĝaj en agrikulturo” kaj firme iras sur la socialisma vojo, kaj dank’ al tio la kolektiva ekonomio akiris grandan disvolviĝon kaj ankaŭ nivelo de agrikultura mekanikigo rapide levigis. Nun, la plejparto de la popolaj komunumoj en la tuta lando havas traktorojn kaj grandajn agrikulturajn maŝinojn, kaj nemalmultaj komunumoj kaj brigadoj jam fundamente efektivigis mekanikigon en plugo, drenado, irigacio, rikolto, draŝo, transporto, flegado de plantaĵoj kaj prilaboro de produktaĵoj de agrikulturo kaj flankokupoj. Ĉion ĉi tion la popolaj komunumoj atingis sub la direkto de la principo de sinapogo sur la propraj fortoj kaj ĉefe sinapogante sur la fortoj de kolektiva ekonomio. Tio plene pruvis, ke tute ĝusta estas la vojo de “unue kolektivigo, poste mekanikigo” laŭ kiu iris la ĉinaj kamparanoj. Komprenoble, la popolaj komunumoj ankaŭ ricevis helpon de la ŝtato en disvolvado de agrikultura mekanikigo. Krom provizado al ili per agrikulturaj maŝinoj la ŝtato fondis por ili en diversaj lokoj altlernejojn, mezlernejojn kaj mallongtempajn trejnajn kursojn por kulturaj senpage teknikistojn. La ŝtato ne nur multfoje reduktis la prezojn de agri-

Falĉmaŝinoj laboras sur stepo de la Interna Mongolio.




kulturaj mekanikaĵoj, sed ankaŭ donis pruntojn kaj senpagajn investojn al la komunumoj kaj brigadoj, kiuj havis malbonajn naturajn kondiĉojn aŭ malmultan kolektivan ekonomion. Tio ankaŭ plirapidigis la disvolviĝon de agrikultura mekanikigo de la popolaj komunumoj.

Post la Granda Proleta Kultura Revolucio, la vasta amaso de laboristoj kaj oficistoj de agrikultura mekanika industrio de Ĉinio pli bone efektivigis la principon de “sendependeco kaj memdecido, kaj sinapogo sur la propraj fortoj” kaj akiris senprecedencan disvolviĝon. Nun en la tuta lando jam stariĝis kompleta agrikultura mekanika industria sistemo de materialo ĝis produktaĵoj, de dizeloj ĝis kompletigaj agrikulturaj aparatoj kaj de fabrikado ĝis riparado. La produktaĵoj de agrikulturaj mekanikaĵoj jam atingis pli ol 1,500 specojn. En la jaro 1974, la produktokvanto de traktoroj plimultiĝis ĝis 5.2-oblo de tiu en 1965; tiu

de mantraktoroj ĝis 35-oblo, tiu de dizeloj ĝis 5.2-oblo kaj tiuj de kombajnoj, agrikulturaj pumpiloj kaj prilaboraj maŝinoj de agrikulturaj kaj flankokupaj produktaĵoj, mekanikaĵoj por plantflegado kaj por uzado en arbaroj, paŝtado, flankokupoj kaj fiŝkaptado ĉiuj grandskale plimultiĝis.

En la disvolviĝo de la ĉina industrio en arbaroj, paŝtado, flankokupoj kaj fiŝkaptado de agrikulturaj mekanikaĵoj oni praktikis la principojn de kombiniĝo de centra registaro kun la lokaj, prenante la lokajn kiel ĉefajn elementojn; de grandaj entreprenoj kun la mezgrandaj kaj malgrandaj entreprenoj, prenante la lastajn kiel ĉefajn elementojn. Krom fondado de grandaj fabrikoj de agrikulturaj maŝinoj per investado de la centra registaro, mezgrandajn kaj malgrandajn agrikultur-maŝinajn industriojn ĉefe disvolvas la lokaj fortoj sinapogante sur la propraj fortoj. Tio estas



Sur la kampo de Hiaŭ-dian-komunumo de Linhian, Henan-provinco

Plugŝipoj fabrikitaj de la agrikulturila fabriko de Honghu-gubernio, Hubej, estas tre bonvenaj al la kamparanoj.



la principo konata kiel “marŝado sur du kruroj”.

Por konstrui grandan modernan entreprenon necesas granda investo, koncentriga materiala forto, modernaj transportaj kondiĉoj, kompare komplikaj teknikaj ekipaĵoj kaj plilonga konstrua tempo kaj tial tiujn povas entrepreni nur la ŝtato. La socialisma Ĉinio estas ankoraŭ evoluanta lando. La industria bazo transprenita de la malnova Ĉinio estis ekstreme malforta. La malnova Ĉinio havis preskaŭ nenan mekanikan industrion siatempe, nek traktorajn fabrikojn kaj kelkaj agrikulturmaŝinaj fabrikoj povis nur produkti kaj ripari malgrandajn akvopumpilojn kaj dizelojn en malgrandaj nombroj. Post la Liberiĝo, la nova Ĉinio nur povas starigi nombron da grandaj ĉefaj entreprenoj per limigitaj monrimedoj kaj ekipaĵoj. Por disvolvi la agrikulturan mekanikigon multe, rapide, bone kaj ekonomie, oni devas samtempe disvolvi la aktivecon ambaŭ de la centro kaj de la lokoj. La diversaj lokoj povas plene utiligi siajn homfortojn kaj riĉfontojn, por starigi mezgrandajn kaj malgrandajn agrikulturilajn fabrikojn laŭ bezonoj de la koncernaj lokoj.

Tiuj malgrandaj fabrikoj ĝenerale bezonas malmultajn investojn kaj mallongajn konstruajn tempojn, kaj povas pli bone servi al agrikulturo per produktado de agrikulturaj maŝinoj konformaj al naturaj kondiĉoj de la lokoj. Nuntempe, en la tuta lando troviĝas 28 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj, kiuj starigis jam traktorajn kaj movmekanikajn industriojn. 96% el la gubernioj starigis agrikulturilajn fabrikojn, kies produkto okupas pliparton de tiu de la tuta lando.


Sinapogante sur la propraj fortoj, Giangsu-provinco starigis traktorajn kaj agrikulturilajn industriojn kaj provizis la kamparon de la tuta provinco per agrikulturaj movmekanikaĵoj kun milionoj da ĉevalpovoj, kelkcent miloj da agrikulturaj pumpiloj, sepdek miloj da mantraktoroj kaj granda nombro da draŝmaŝinoj kaj prilaboraj maŝinoj por produktaĵoj de agrikulturo kaj flankokupoj kaj por flegado de plantoj. Krome la provinco ankaŭ produktis kompletajn ekipaĵojn por produkti kemisterkon, tiel ke pli ol 70 ĝiaj gubernioj kaj urboj ekhavis siajn kemisterkajn fabriketojn.

Ekde la Granda Proleta Kultura Revolucio, ankaŭ en nacimalplimultaj regionoj situantaj ĉe landlimoj de Ĉinio rapide disvolviĝis agrikulturmaŝina afero. En la ebenaĵoj, montregionoj, ĝuang- kaj jaŭ-vilaĝoj de Guanghi-a Ĝuang-nacia Aŭtonoma Regiono ĉie funkcias traktoroj kaj movmekanikaĵoj fabrikitaj de la aŭtonoma regiono mem. En la Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono la areo plugita per maŝinoj jam atingis 54%, la areo irigaciata per maŝinoj 75%. Kaj 30% el traktoroj estas fabrikitaj de la regiono mem.

Por subteni la agrikulturon la industriaj branĉoj de la nova Ĉinio ofte rompis la profesiajn limojn kaj organizis sin por fari socialisman kunlaboron kaj produkti grandan nombron da urĝe bezonataj agrikulturaj maŝinoj en mallonga tempo, aŭ provprodukti multajn novajn produktaĵojn laŭ la lokaj naturaj kondiĉoj, plue rapidigante la paŝojn de agrikultura mekanikigo de Ĉinio.

13 provincoj kaj urboj en la suda Ĉinio kunlabore esploris por fabriki 17 akvokampajn mekanikaĵojn (inkluzive pli ol 60 specojn de maŝinoj kaj instrumentoj), en tiu kunlaboro partoprenis pli ol 100 fabrikoj, pli ol 30 institutoj kaj 9 altlernejoj. Nun plejparto de ili jam havis tipajn modelojn kaj estas provataj en produktado. Kaj multaj el ili jam estis definitive produktataj, provizante kondiĉojn por rapidigi mekanikigon de rizprodukto.

Pro la vasta teritorio de Ĉinio, en ties diversaj lokoj la naturaj kondiĉoj, la terkulturaj metodoj kaj la plantaj specoj estas tre diferencaj. Por fabriki diversajn agrikulturajn maŝinojn konformajn al la bezonoj de diversaj lokoj, necesas precipe disvolvi amasan reforman movadon, krom starigo de specialaj institutoj por esplori kaj projekti diversajn maŝinojn kaj instrumentojn. La popolaj amasoj havas riĉajn praktikajn spertojn kaj ili fabrikis grandan nombron da mezgrandaj kaj malgrandaj agri-



Irigaciado kaj drenado per elektro havigis al la regiono ĉe la lago Dongting riĉajn rikoltojn de agrikulturo en sinsekvaj jaroj.

kulturaj mekanikaĵoj kun simpla strukturo kaj facila manipulebleco, ekzemple, rizid-transplantilo, mekanikigita plugboato por kotaj akvokampoj, multuza bed-konstrua maŝino, interplantvica plugmaŝino kaj boato por eltiri ŝlimon el river- aŭ lag-fundoj.

La agrikultura mekanikigo de Ĉinio laŭplane disvolviĝas laŭ la bezonoj de agrikultura pliprodukto de diversaj lokoj. En ebenaĵoj de la nordoriento kaj Hingiang oni aktive mekanikigas plugadon por solvi problemon de nesufiĉo de homfortoj kaj brutoj. En multaj montetaj regionoj en la sudo oni starigis milojn kaj dekmilojn da elektraj akvolevaj stacioj kaj akvoturbinaj pumpstacioj. En riverriĉaj kaj lagaj regionoj, kiuj facile suferas akvostagnojn kaj inundojn, oni starigis multajn elektrajn pumpilajn staciojn. En sekecaj akvomankaj re-

gionoj en la nordo kaj la nordokcidento de Ĉinio oni energie disvolvas irigaciadon per mekanigitaj putoj. Por batali kontraŭ sekco, Hebej-provinco starigis en la lastaj jaroj 16 dizelfabrikejojn kun jara produktokvanto de preskaŭ du milionoj da ĉevalpovo kaj konstruis pli ol 400,000 putojn komplete mekanigitajn. Dank' al tio oni venkis sekecojn kaj akiris riĉrikoltojn en sinsekvaj jaroj.

Nun sub kuraĝigo de grandioza tasko elmetita de la Kvara Tutlanda Popola Kongreso, la laboristoj kaj kamparanoj de Ĉinio kun plena memfido klopodas laŭ la vojo montrita de Prezidanto Maŭ Zedong por rapidigi la paŝojn de agrikultura mekanikigo.

Teknikistoj de la Ŝaŭguan-a Dizela Fabriko de Guangdong riparas dizelon en produkta brigado.



Traktoroj produktitaj de la Luojang-a Traktora Fabriko Dongfunghong




Nova Paĝo pri Sinapogo sur la Propraj Fortoj

—Pri disvolviĝo de agrikultura mekanikigo en Jantaj-subprovinco

EN januaro, sur Ŝandong-duoninsulo estas frosta vintro, sed en la vasta kamparo de Jantaj-subprovinco situanta en la oriento de la duoninsulo leviĝis arda alttajo de kampa konstruado. Multaj traktoroj “Dongfanghong-20” kun remorko estas

Iu laborejo de la Vejhaj-a Kemisterka Fabriko




okupataj en transportado de tero por ebenigi la kampon. Iu traktoristo diris kun rideto: “Jen, kiel bonaj estas la traktoroj fabrikitaj de nia loko mem!”

Jantaj-subprovinco situas en montetregiono. Antaŭ la Liberiĝo, tie troviĝis preskaŭ neniu mekanka industrio, por ne paroli pri maŝinfabrikado por agrikultura produkto. Nun en la nomita subprovinco oni jam povas grandnombre produkti traktorojn, dizelojn k.a. konformajn al la lokaj naturaj kondiĉoj. Respondeculo de la subprovinco diris: “Tio estas venka frukto de la Granda Proleta Kultura Revolucio!”

1

En februaro de la jaro 1967, la Revolucia Komitato de Jantaj-subprovinco naskiĝis en la Granda Proleta Kultura Revolucio. Observante la instrukcion de Prezidanto Maŭ “**teni la revolucion, stimuli la produkton**”, la kamaradoj de la revolucia komitato decidis konduki vastajn amasojn en disvolvado de socialisma produkto per nova penso kaj nova laborstilo. Ili diligente studas verkojn de Marks, Lenin kaj Prezidanto Maŭ kaj profundiĝis en la vastan kamparon por fari enketadon. Tie ili vidis indignan kritikon de la amasoj al la reviziisma linio de Liu Ŝaŭki kaj grandan revolucionan energion de la komunumanoj en batalado kontraŭ naturo. En la brigadoj Hiadinggia, Niegia kaj aliaj ili vidis, ke la disvolviĝo de agrikultura mekanikigo alportis pliprodukton al greno jaron post jaro. En Ĵongĉeng-gubernio, ili vidis kiel la gvidantoj kaj amasoj decidis klopodi por efektiviigi agrikulturan mekanikigon. En iu brigado de Lajhi-gubernio ili vidis kiel ĝojas la komunumanoj post aĉeto de dizelo, kiuj diris: “Bona estas la pumpstacio, ĝi tamen ne povas funkcii sen dizelo!”

Laboristoj de la agrikulturila fabriko interkonsiliĝis kiel plibonigi provproduktitan ŝovelmaŝinon.



La instrukcio de Prezidanto Maŭ **“La fundamenta elirejo de agrikulturo estas mekanikigo”** kaj postulo de la amasoj pluapaaŝe komprenigis al la kamaradoj de la revolucia komitato la gravan signifon de agrikultura mekanikigo. Tial ili decidis disvolvi produkton de agrikulturaj maŝinoj por pluapaaŝe liberigi produktajn fortojn kaj akceli socialisman agrikulturan produktadon.

Por fabriki agrikulturajn maŝinojn oni bezonas grandan kvanton da ŝtalo kaj fero. Sed de kie ili venas? La revolucia komitato diris: Ni ne devas peti helpon de la ŝtato, sed devas konstrui nian malgrandan ferŝtalan kompanion nin apogante sur niaj propraj fortoj por produkti ŝtalon kaj feron.

La informo rapide disvastiĝis al 17 gubernioj kaj urboj de Jantaj-subprovinco. Vastaj amasoj unuj post aliaj sin anoncis por partopreni en konstruado de la malgranda ferŝtala kompanio por kontribui per sia forto al agrikultura mekanikigo de la subprovinco.

Mankis tiam al la konstruado materialoj kaj ekipaĵoj, ili do aĉetis de alilokaj fabrikoj kaj minejoj eluzitajn kaj malnovajn ekipaĵojn por denove uzi

ilin post prilaborado kaj reformado. Krome, ili ankaŭ mem fabrikis iujn neaĉeteblajn maŝinojn en simplaj kondiĉoj. En la komenco la maŝinripara laborejo de ferminejo havis nur du rimenajn tornilojn, tri tenajlojn kaj unu fornon. Ĝuste per tiuj simplaj instrumentoj la laboristoj rapide riparis kaj fabrikis 39 maŝinojn por minejo, tiel ke la malgranda ferminejo ekfunkciis post nelonge. Ankaŭ la kompleksa oksigenprepara maŝino estis fabrikita de laboristoj de ŝtalfabriko mem. La 131 ĉefaj ekipaĵoj de la malgranda ferŝtala kompanio, escepte de 18 aĉetitaj de aliaj lokoj, ĉiuj estis reformitaj aŭ fabrikitaj de la laboristoj mem.

La konstruantoj de la malgranda ferŝtala kompanio ankaŭ renovigis teknologion kaj kreis bonajn sukcesojn. La fermino uzata de la nomita kompanio estas ercomalriĉa. Post ercoselektado, ĝia pureco altiĝis de malpli ol 30% ĝis 64%. Sed la selektistoj ne kontentiĝis pri tio, ili daŭre faris eksperimentojn kaj pluapaaŝe plibonigis ercoselektan teknologion tiel ke ĝia pureco atingis 68%. Por multe produkti bonan feron, laboristoj de la ferfabriko decidis fabriki ercoglobojn kaj per tiuj nutri la malgrandan altforon. Post ĉ. cent eksperimentoj ili sukcese faris ercoglobojn el ercopulvoro,

kiuj altiĝis la ercouzeblecon de 60 % de aglomerita erco ĝis pli ol 80 %.

Sinapogante sur siaj propraj fortoj homa, materia kaj financa, Jantaj-subprovinco konstruis per tri jaroj kompare kompletan malgrandan ferŝtalan kompanion inkluzive de ercoekspluatado, ercoselektado, ercoglobigado, aglomerado, ferfandado, ŝtalforĝado kaj laminatado kaj finis per tio la historion de neprodukto de fero kaj ŝtalo de antikeco. Nun la skalo de la malgranda ferŝtala kompanio estas pli granda, ĝiaj jaraj produktokvantoj de ŝtalo kaj fero altiĝis respektive je 200 % kaj 100 % kompare kun tiuj de la komenco, kio faras pli grandan kontribuon al la agrikultura mekanikigo de la subprovinco.

2

En la jaro 1970, kiam la malgranda ferŝtala kompanio estis finkonstruita kaj komencis produkton, la revolucia komitato de la subprovinco diskutis la problemon pri grandnombra produkto de agrikulturaj maŝinoj. En la kunveno iu diris: "Por po-grande fabriki agrikulturajn maŝinojn, oni unue devas konstrui novan grandan fabrikon." Aliaj tamen opiniis ke konstrui novan fabrikon bezonas grandan investon kaj longan tempon de 3-5 jaroj,

tio rekte influos rapidecon de agrikultura mekanikigo kaj ne konformas al la spirito de la ĝenerala linio por konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie. Oni devas liberigi la latentajn fortojn de nunaj fabrikoj kaj vaste disvolvi socialisman kunlaboron, nur per tio oni povas rapidigi la paŝon de agrikultura mekanikigo. La kunveno decidis stariĝi komandejon de kampanjo por produkti agrikulturajn maŝinojn de la subprovinco, por ke la fabrikoj de la loko sub unueca gvido rapide produktu traktorojn, dizelojn kaj aliajn ĉefajn motoromaŝinojn kaj iliajn akcesoraĵojn.

La decido de la revolucia komitato de la subprovinco spegulis la deziron de amasoj. Kiam la tasko asigniĝis al ĉiuj fabrikoj, tuj ekdisvolviĝis arde la amasa kampanjo por produkti agrikulturajn maŝinojn.

La fabrikoj ricevintaj la taskon ĉiuj esprimis: "Ni nepre ne prokrastigu la trajnon de la kampanjo en nia stacio." La Kaŭĉuka Fabriko de Vejhaj, kiu fabrikas ordinare kaŭĉukajn ŝuojn, ricevis tamen la taskon fabriki pneŭmatikojn por traktoroj. Tiam mankis al ili ekipaĵoj kaj sperto, ili do mem fabrikis ilin kaj lernis en praktiko. Tiamaniere ili konstruis laborejon de pneŭmatikoj kaj plenumis la taskon. La komandejo asignis al la Fabriko de Agrikulturaj



Plugado per maŝinoj en Fufeng-komunumo de Gimo-gubernio

Maŝinoj de Vendeng-gubernio la taskon fabriki 140 krankojn en 20 tagoj por la ĉefmaŝina fabriko. La tempo estis mallonga kaj la tasko peza, kaj mankis tiam al la fabriko modelilo de kranko. Sed post penlaborado en tri tagnoktoj, la laboristoj de laborejo de akcesoraĵo fine fabrikis modelilon kaj per tio garantiis la produktadon de krankoj. Foje, kiam la fabriko informiĝis, ke Dizela Fabriko de Muping urĝe bezonas krankojn, ili tuj portis la krankojn al Muping pli ol 50 kilometrojn fora.

“Kion la kampanjo bezonas, tion ni faras!” Ankaŭ la fabrikoj, kiuj ne ricevis taskon de la kampanjo, ĉiamaniere klopodis por servi al la kampanjo. Vidinte pezan taskon de frataj fabrikoj, la Muping-a Fabriko de Agrikulturaj Maŝinoj iniciate prenis sur sin la taskon de la kampanjo produkti urĝe bezonatan sferoidizitan gisaĵon kaj ĝin plenumis antaŭdate je ok tagoj. Kiam la traktora fabriko urĝe bezonis kamŝaftojn en ĝenerala muntado, la Kusineta Fabriko de Jehian-gubernio iniciate akceptis la taskon frezi kamŝaftojn.

“Kun alies helpo ni devas pli energie labori!” Tion diris kaj faris la fabrikoj, kiuj ricevis la taskon produkti ĉefan maŝinon de traktoro. Kiam la Traktora Riparejo de Lajjang, al kiu mankis specialaj ilmaŝinoj por pogrande produkti traktorojn, akceptis la taskon de fabriko de ĉefaj maŝinoj kaj de ĝenerala muntado, ĝi tuj organizis laboristojn por reformi kaj provfabriki tiajn ilmaŝinojn. Maljuna laboristo Liu Fengki ne bone dormis en duonmonato por reformi iun ilmaŝinon; juna laboristo Lin Mingji veturis al alia loko je miloj da kilometroj malproksima por lerni tie teknikon kaj serĉi materialojn por provfabriki likvopreman tondilon. Tiamaniere ili reformis kaj provfabrikis ĉ. cent ilmaŝinojn kaj ŝanĝis la riparejon en traktorfabrikon. En la lasta jaro, la fabriko produktis 1,500 traktorojn “Dongfanghong-20”.

En la kampanjo por produkti agrikulturajn maŝinojn la tri riparejoj de agrikulturaj maŝinoj de Jantaj, Muping kaj Gimo reformiĝis en tri dizelajn fabrikojn. Nun ili kaj aliaj fabrikoj de la loko ĉiujare povas produkti agrikulturajn motormaŝinojn kun 340,000 ĉevalpovo kaj faris per tio kontribuojn por mekanikigo en plugado, drenado, irigaciado, draŝado, dispecigo, muelado kaj aliaj.

3

En la kampanjo, la revolucia komitato de la subprovinco ankoraŭ liveris pli ol 3,000 ĉefajn ekipaĵojn kaj disponigis milionojn da juanoj el lokaj enspezoj al la agrikulturmaŝinaj riparejoj de guber-

nioj kaj komunumoj por subteni ilian konstruadon. Nun en la tuta subprovinco jam formiĝis unu post alia de gubernio ĝis komunumoj kaj brigadoj retoj por fabriki kaj ripari agrikulturajn maŝinojn. Ni iam vizitis Jehian-gubernion por informiĝi pri ĝia fabrikado kaj riparado de agrikulturaj maŝinoj.


En la korto de la Dua Fabriko de Agrikulturaj Maŝinoj de Jehian-gubernio, multaj brile ruĝlakitaj malgrandaj traktoroj saltis en niajn okulojn. La respondeculo de la fabriko diris al ni: Antaŭ du jaroj, komunumanoj demandis al ni: “En aliaj lokoj oni instalas gambojn al malgranda dizelo por ke ĝi povu plugi, dreni kaj irigacii, kial vi ne tiel faras por ni?” “Kion bezonas la agrikulturo, tion ni devas fari!” La laboristoj de la nomita fabriko decidis havigi “gambojn” al malgrandaj dizeloj. Ili iris al aliaj lokoj por akiri desegnaĵon de malgranda traktoro, reformis ordinaran ilmaŝinon kaj fine fabrikis la unuan malgrandan traktoron venkinde multajn malfacilojn. La laboristoj ĝoje diris: “Nia deziro subteni agrikulturon vere efektiviĝis!” En la jaro 1974, ili produktis 300 malgrandajn traktorojn, kiuj ricevis bonvenon de komunumanoj.

La Riparejo de Agrikulturaj Maŝinoj de Hjugiakomunumo riparas ĉion de ferkulero kaj ferkruĉo ĝis traktoro. Post la Granda Proleta Kultura Revolucio, la fabriko pluapaŝe starigis en si penson servi al la agrikulturo. Rimarkinte, ke en rikolta kaj sema sezonoj komunumanoj ofte venis por peti riparon al iliaj agrikulturaj maŝinoj, tio ne nur malŝparis laborfortojn sed ankaŭ prokrastis agrikulturan produkton, laboristoj de la fabriko decidis iri al kamparo kun instrumentoj por tie fari riparadon. En vespero de la lasta aŭtuno, difektiĝis la semmaŝino de Hoŭgia-brigado. Kiam la kadroj maltrankviliĝis pri tio, laboristoj de la fabriko jam venis kun instrumentoj. Estro de la brigado ĝoje diris: “Vi ja vere estas servemaj, ni nepre pli bone kulturos kampon kaj multe pliproduktos grenon por subteni ŝtatan konstruadon.”


Guogadian-komunumo ĉiujare kulturas arakidojn en granda areo. En aŭtuna rikolta sezono viroj kaj virinoj, maljunuloj kaj junuloj de multaj produktaj brigadoj de la komunumo devis mane pluki ternuksojn kaj iam la laboro eĉ daŭris ĝis vintro. Pro tio komunumanoj diris: “Kiel bone estos, se ankaŭ ni havos maŝinon!” Laboristoj kaj oficistoj de la komunuma fabriko de agrikulturaj maŝinoj decidis provfabriki ternuksan plukilon por liberigi laborfortojn. Laŭ teorio de ĝenerala draŝilo ili faris desegnaĵon kaj sukcese provfabrikis plukilon malgrandan kaj facile moveblan, kiu povas

deŝiri 500 kilogramojn da ternuksoj en unu horo. Per la maŝino unu produkta brigado bezonas nur 3-4 tagojn por plenumi la tutan taskon. Komunumanoj laŭdis: "La fabriko de agrikulturaj maŝinoj faris novan meriton por ni."

Rikoltado de tritiko en Taŭcun-komunumo de Kihia-gubernio



Traktoroj produktitaj de la Lajjang-a Traktora Fabriko



Kun disvolviĝo de agrikultura mekanikigo, Jehian-gubernio starigis sinsekve kvar fabrikojn por ripari kaj produkti agrikulturajn maŝinojn. Ĉiu komunumo havas tian riparejon kaj ĉiu brigado tian grupon. Ĉiujare antaŭ rikolta kaj sema sezonoj la gubernio organizis riparan grupon de agrikulturaj maŝinoj, kiu venis al komunumoj kaj brigadoj por kontroli kaj ripari agrikulturilojn. Kaj krome la fabrikoj de agrikulturaj maŝinoj sendis siajn laboristojn al kamparo por partopreni en agrikultura produkto. La laboristoj de la fabrikoj de agrikulturaj maŝinoj de la gubernio kaj komunumoj fabrikis ne nur grandan nombron da akcesoraĵoj de agrikulturaj maŝinoj, sed ankaŭ pli ol 20,000 novajn agrikulturajn maŝinojn kaj instrumentojn konformajn al tieaj naturaj kondiĉoj.

Jehian-gubernio estas miniaturo de Jantaj-subprovinco en la riparado kaj fabrikado de agrikulturaj maŝinoj. Nun en la tuta subprovinco, ĉiu gubernio havas tian fabrikan, ĉiu komunumo tian riparejon, kaj pli ol 90% de la brigadoj tian grupon. En la lastaj jaroj, la fabrikoj funkciigataj de gubernioj kaj komunumoj ne nur riparas grandan nombron da agrikulturaj maŝinoj, sed ankaŭ fabrikis pli ol 3,000 malgrandajn traktorojn, pli ol 1,500 dizelojn kaj fariĝis unu grava forto en riparo kaj fabriko de agrikulturaj maŝinoj de la subprovinco.

La disvolviĝo de agrikultura mekanikigo ne nur liberigis produktoforton, sed ankaŭ vekis ĉe vastaj amasoj de komunumanoj energion por reformi naturon kaj akcelis agrikulturan produkton de la tuta subprovinco. Nun la meznombra pomua produktokvanto de greno de la tuta subprovinco jam plimultiĝis de 185 kilogramoj de 1965, la jaro antaŭ la Granda Proleta Kultura Revolucio, ĝis 335 kilogramoj. Kaj tiu de kvar gubernioj superis 400 kilogramojn, tiu de unu urbo superis 500 kilogramojn. Dank' al la disvolviĝo de agrikultura mekanikigo, leviĝis la povo de komunumoj kaj brigadoj kontraŭ katastrofoj. En la jaro 1972, drenaj kaj irigaciaj maŝinoj de Huanghian-gubernio plimultiĝis ĝis pli ol 6,000, dank' al kio la gubernio venkis seriozan trosekecon, kaj ĝia pomua produktokvanto de greno unuafoje superis 400 kilogramojn. En Jegi-brigado de tiu gubernio jam efektiviĝis mekanikigo de plugado, drenado, irigaciado, draŝado kaj muelado, kaj ĝia pomua produktokvanto de greno superis 500 kilogramojn. La komunumanoj ĝoje diris: "Ni Jegi-anoj nun ne plu uzas bovon en plugado, oleon en lumigado kaj norion en terakvumado, ne bezonas maltrankviliĝi pri farunmuelado kaj olepremado, kaj nia vivo pli kaj pli boniĝas!"

Li-naciaj Junuloj

La teoria grupo el junuloj ludas aktivan rolon en la movado de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio. Jen ili en studado.



Ĉinio estas lando kun multaj nacioj. Kaj li-nacio, kiu loĝas sur Hajnan-insulo de Guangdong-provinco, estas unu el la membroj de nia granda nacia familio.

Sub la kruela regado de reakciuloj en la historio kaj Kuomintango, li-naciaj popolanoj, same kiel alinaciaj popolanoj, suferis profundan nacian subpremon kaj dronis en mizera abismo. Iliaj ekonomio kaj kulturo estis tre postĝintaj, kaj la agrikulturo sin trovis en duonprimitiva stato. Ili ne havis sian propran lingvon, tial ili registris jarojn kaj aferojn per lignogravurado kaj ŝnurnodado.

Post la Liberiĝo, sub la lumo de la naciaj politikoj de la Partio kaj Prezidanto Maŭ Zedong, li-naciaj popolanoj fariĝis mastroj en politiko kaj ankaŭ akiris rapidan disvolviĝon en ekonomio kaj kulturo. Gvidate de la Partio, la laboremaj, saĝaj kaj bravaj lioj obstine transŝanĝis postĝintan fizionomion lasitan de la malnova socio, konstruis novajn socialismajn urbojn kaj vilaĝojn, kaj ilia vivo iom post iom pliboniĝis. Kaj samtempe, nova generacio de li-nacio sane kreskas. En la lastaj pli ol 20 jaroj, nombro da li-naciaj diplomitoj de mezlernejoj aŭ altlernejoj revenis al sia hejmloko por konstrui novajn socialismajn li-vilaĝojn, kaj ili fariĝis konstrua armeo.




Jen ili uzas la lernitan
sciencan scion en pro-
duktado por esplori kiel
kulturi rizplantidojn.



Gejunuloj estas ĉefa forto
en kolektiva laborado.

Li-nacia kampo



Volejbala matĉo en laborpaŭzo





Literatura kaj arta propaganda taĉmento ofte faras prezentadon al komunumanoj.



Interŝanĝi novan teknikon pri enbranĉo de gumarbo.



Juna li-a kuracistino

Agrikultura Mekanikigo de Ĝuang-a Montregiono

VUMING en la meza kaj suda parto de la Guanghi-a Ĝuang-nacia Aŭtonoma Regiono estas unu el la gubernioj koncentre loĝataj de ĝuang-oj. Kvankam ĝi situas en regiono plena de montetoj kaj montoj, tamen oni jam vaste uzas mekanikajn agrikulturilojn. La areo uzanta rizidtransplantajn maŝinojn jam atingis 84% de rizkultura areo de la tuta gubernio kaj la areo plugata kaj erpata per maŝinoj jam atingis 60%. En drenado, irigaciado, flegado de plantoj, en draŝado kaj prilaborado de agrikulturaj kaj flankaj produktaĵoj, iuj brigadoj jam tute kaj aliaj jam parte uzas maŝinojn. Krome en la gubernio oni jam starigis tutan reton da agrikulturmekanikaj riparejoj kaj fabrikoj de supre ĝis malsupre.

1

La agrikultura mekanikigo de Vuming estis komencita post la agrikultura kolektivigo. En la komenco de la kvindekaj jaroj, post la efektivigo de agrara reformo, la popolo de la tuta gubernio alfrontis la problemon kiel eble plej rapide restarigi kaj disvolvi la agrikulturan produkton. Tie la plejparto de la agroj troviĝas sur deklivoj kaj montoj, kiuj precipe timas sekecon. Por batali kontraŭ naturaj katastrofoj kaj iri la vojon kondukantan al kuna riĉiĝo, kamparanoj sekvis la alvokon de la Komunista Partio de Ĉinio kaj unuj post aliaj organizis sin en agrikulturaj produktaj kooperativoj. Ili decidis sub la gvido de la Partio senĉese disvolvi produkton apogante sin sur la fortoj de kolektiva ekonomio. Ili faris planon de agrikultura disvolviĝo, aktive entreprenis agrikulturan fundamentan konstruadon, faris multajn montlagojn kaj akvorezervejojn por disvastigi irigacian areon. Samtempe ili reformis malnovajn produktajn instrumentojn, disvastigis novtipajn plugilojn, sarkilojn kaj aliajn reformitajn agrikulturilojn. Ili komencis provplanti dufoje rizon en unu jaro, por turni unu rikolton en unu jaro en du.

En la jaro 1958, la tuta gubernio efektivigis la fondon de popolaj komunumoj. Samjare, kvar

grandaj akvorezervejoj fundamente finkonstruiĝis en la tuta gubernio. Dank' al tio la areo de du kulturadoj de rizo en unu jaro grandmezure plivastiĝis, manifestante la superecon de la popola komunumo.

La vasta disvolviĝo de agrara fundamenta konstruado kaj disvastiĝo de la areo por du kulturadoj de rizo en unu jaro, pli kaj pli kaŭzis mankon de laborfortoj en la tuta gubernio. En la jaro 1959, Prezidanto Maŭ Zedong eldonis la instrukcion al la tuta lando: **“La fundamenta elirejo de agrikulturo estas mekanikigo”**, montrante al ili la direkton de antaŭenmarŝo. Multaj komunumoj de la gubernio starigis nombron da fabrikoj de agrikulturaj maŝinoj. Tiuj fabrikoj laŭ la aktualaj apartaj kondiĉoj kaj komencante per lokaj metodoj sukcesis prove fabriki specon de lignaj rizidplantiloj, por anstataŭi la manajn laborojn. Kaj samtempe ili produktis grandajn nombrojn da pedalaj draŝiloj, rikoltfalĉiloj, du-radaj ĉaroj kaj aliaj novtipaj agrikulturiloj. Ili paŝis la unuan paŝon sur la vojo

Lernantinoj de la agrikulturila lernejo en Vuming-gubernio lernas manipulado de traktoro.



al agrikultura mekanikigo. Poste, kun disvolviĝo de la produkto kaj senĉesa fortigo de la kolektiva ekonomio, ĉiuj popolaj komunumoj aĉetis nombron da traktoroj kaj motoroj kaj komencis uzi maŝinojn ankaŭ en plugado, drenado, irigaciado, draŝado kaj en prilaborado de agrikulturaj kaj flankaj produktaĵoj. De tiam, modernaj agrikulturaj mekanikaĵoj plimultiĝas tagon post tago en la gubernio.

Trapasinte la Grandan Proletan Kulturajn Revolucion, la popolo de Vuming marŝas antaŭen sur la socialisma vojo kun plena memfido. Ili pliantas pri disvolvado de la supereco de la popola komunumo kaj atingis tre grandan sukceson sinapogante sur la propra kolektiva ekonomio por disvolvi agrikulturajn mekanikigojn. La komunumanoj de Ganju-brigado de Ŝuangkiaŭ-komunumo en la tempo de energia disvolvado de produkto de grenoj, aktive komencis samtempe entrepreni multajn maŝinajn konstruadojn. Ili ekspluatis virgajn terojn sur la montdeklivoj, plantante multajn fruktarojn kaj bambuojn, ekbredis porkojn kaj fiŝojn. Krome ili elfosis ercojn por la ŝtato utiligante la neokupitajn tempojn de agrikulturaj laboroj. Per mono akumulita per flankaj produktoj, ili aĉetis ses traktorojn, ekipis sin per kvar kilometroj da altensia elektrofado, kaj plie provizis sin per elektraj motoroj, grenmuelaj maŝinoj, pulvorigaj maŝinoj kaj frotmaŝinoj por tefolioj. Tio akcelis grandan paŝon antaŭen en agrikultura mekanikigo de la tuta brigado.

La komunumanoj de Hinfu-brigado sub Ningvu-komunumo konstruis baraĵon inverse trans la

rivero Vuming kaj instalas dek akvoturbinajn pumpilojn kaj unu generatoron. Havante elektroenergion, la brigado starigis prilaborojn por flankaj produktaĵoj, kaj akumulis per tio certan monsumon por havigi al la kolektivo traktorojn, elektrajn motorojn kaj dizelojn. Tiuj maŝinoj estas uzataj en kamparaj laboroj dum laborplenaj sezonoj; kaj dum la sezonoj kiam mankas laboroj sur la kamparo, ili estas uzataj por prilaborado de produktaĵoj kaj muelado de rizo, pliigante la kontantajn enspezojn por la komunumanoj kaj fonton de akumulado por aĉeti novajn agrikulturajn mekanikaĵojn. La amasoj nomas tiun metodon kiel "ovometado de kokino". Aplikante tiun metodon multaj komunumoj kaj brigadoj de la gubernio akiris por si bezonajn agrikulturajn mekanikaĵojn. En la jaro 1974, la totala nombro de grandaj, mezaj kaj malgrandaj traktoroj en la tuta gubernio plimultiĝis per 14-oblo en komparo kun tiu en la jaro 1965, tiu de aliaj agrikulturaj mekanikaĵoj ankaŭ kreskis per 4-oblo. 79% de la investoj por tiuj maŝinoj venas de kolektiva ekonomio kaj nur malmulta parto de pruntedonoj de la ŝtato. Komunumanoj fiere diris: "Niaj maŝinoj plejparte estas akiritaj per la laboro sur la deklivoj, ercofosado el la tero, fiŝkaptado en akvo kaj fruktoklekto de sur arboj."

2

Por adaptiĝi al la nova situacio de agrikultura mekanikigo la gubernia komitato de Vuming de la Komunista Partio de Ĉinio tre zorgis pri kulturaĵo de teknikaj laborantoj. En tio ili tamen ĉiam

Dizela rizidtransplantilo en laboro



persiste starigis sin sur la principo de sinapogo sur la propraj fortoj kaj disvolvis aktivecon de la gubernia registaro, komunumoj kaj brigadoj por kune plenumi tiun laboron. La agrikulturmaŝina stacio de la gubernio speciale starigis trejnajn kursojn por kulturi diversajn teknikistojn por komunumoj kaj brigadoj. Poste oni plie fondis speciale agrikulturan mekanikistan lernejon. Ili elektis en la kamparo tiujn gejunulojn, kiuj estas elstaraj en politika konscio kaj bonaj en laborado, por ilin lernigi je tekniko dum duonjaro, tiel ke ili povos posedi la fundamentan teorion, scii la uzadon de koncernaj maŝinoj kaj fari ordinarajn riparojn. Diversaj komunumoj kaj brigadoj ankaŭ laŭ siaj bezonoj funkciigis mallongtempajn kursojn aŭ per la metodo de lernigo de nova lernanto per helpo de malnova lerninto por eduki grandkvante manipulantojn, funkciantojn kaj direktistojn de traktoroj, rizidplantmaŝinoj, dizeloj kaj riparistojn de tiuj maŝinoj kaj elektristojn. Dank' al disvolviĝo de la aktivecoj de diversaj flankoj, la tuta gubernio jam formis teknikan vicaron por agrikulturaj maŝinoj el pli ol 40,000 personoj. Inter ili 90% estas el ĝuŝang-oj. Tiuj teknikistoj plejparte estas gejunuloj kaj ili tre zorgas pri agrikultura mekanikiga afero, varme amas kolektivon kaj ekludis pli kaj pli grandan rolon en agrikultura fronto.

Komunisto Li Keven, laboristo de la agrikulturmaŝina riparejo de Luvo-komunumo estas promociita kiel vicedestro de la riparejo. Reveninte al la riparejo post lernado en la gubernia agrikulturmaŝina fabriko, li ĉiam senlace laboras, ĉu pezan laboron aŭ malpuran li ĉiam plenumas ĉefronte. Se oni sendis al ili difektitajn agrikulturajn maŝinojn, li tuj komencis ripari ilin kun la laboristoj. En la sezono por rikoltado aŭ semado, li aktive partoprenis en rondiran riparan grupon, por serioze kaj senlace ripari difektitajn maŝinojn por produktaj taĉmentoj unuflanke kaj pacience instrui riparajn teknikojn al komunumanoj aliflanke, tiel ke li ofte ricevas laŭdojn de komunumanoj. Ĉar en ĉiu komunumo troviĝas multaj tiaj teknikistoj kiel Li Keven, tial pli ol 85% de la diversaj agrikulturaj mekanikaĵoj de la tuta gubernio estas konstante konservataj en bona stato. En la lasta jaro la nombro de traktoroj de la gubernio konservataj en bona stato atingis 90%.

En la lastaj jaroj, komunumanoj de ripara grupo de Ŝuliang-brigado de Hianhu-komunumo por agrikulturmaŝinoj persistis konstrui agrikulturajn mekanikaĵojn en diligento kaj ŝparemo. Ili akiris de la butikoj de agrikulturaj materialoj kaj la pumpilstacio nombron da difektitaj maŝinoj kvalifiki-

taj kiel neuztaŭgaj kaj riparis kaj reformis ilin en dizelojn, krome mem konstruis mekanikigitajn draŝilojn kaj ventumilojn. Dank' al tio la tuta brigado efektivigis la mekanikigon de draŝado kaj prilaboro de produktaĵoj kaj samtempe ŝparis elspezojn.

La mekanikaj laboristoj kaj teknikistoj de tiu gubernio, krome, konstante iras al la kamparo por enketi la praktikajn bezonojn de la agrikultura produkto kaj sukcesis fabriki kaj kopii unu post alia ŝovelmaŝinojn, blovsekigajn maŝinojn, ŝprucakvumajn maŝinojn kaj draŝmaŝinojn, boatojn por mekanika plugado, semmaŝinojn por maizo, sarkmaŝinojn por rizkampoj kaj aliajn, kontribuante en akcelado de agrikultura mekanikigo de la tuta gubernio.

3

La popolo de Vuming persiste iras sur la socialisma vojo, disvolvas agrikulturan mekanikigon, sinapogante sur la propraj fortoj, liberigis grandan nombron da laborfortoj kaj rapidigis la paŝojn de kampa fundamenta konstruado. En la lastaj tri jaroj, la totala kvanto de investitaj laborfortoj kaj plenumita laborkvanto de la kampa fundamenta konstruado de la gubernio egalas la sumon de la pli fruaj dek jaroj. La areo de kampoj garantiataj por riĉa rikolto tiel en sekaj jaroj kiel en jaroj de troabundo de pluvo jam okupis 87% de la totala surfaco de kulturataj agroj. En la lasta jaro, kvankam tie okazis granda sekeco malofte renkontita, tamen la agrikulturo ankoraŭ akiris bonan rikolton de la historio. La pomua produktokvanto de greno jam atingis 436 kilogramojn, kaj la produktokvantoj de tabako, sukerkano kaj fruktoj de la tuta gubernio plimultiĝis respektive per 47%, 3.5-oblo kaj 11-oblo kompare kun tiuj antaŭ naŭ jaroj.

Kun profunda disvolviĝo de la movado "lerni de Daĝaj en agrikulturo" kaj altigo de mekanikiga nivelo al la gubernio Vuming okazas profunda ŝanĝiĝo. Tie, la antaŭa virga tero nun jam fariĝis sukerkano-plantejoj; la malutila rivero farinta multajn plagojn en la histrio nun jam servas al la popolo en irigacio kaj energioprodukto; la deklivaj teroj ekstreme malebenaj jam estis konstruitaj en kampojn plugeblajn per maŝinoj; multaj virgaj kaj sovaĝaj montoj estas kovritaj per verdaj arbaroj kaj fariĝas novaj produktaĵoj de lignoj kaj fruktoj; tie, kie bestoj iam restigis piedsignojn, nun aperis jam unu post alia fabrikoj. En Vuming-montregiono prosperas la merkato kaj manifestiĝas nova aspekto de la nova socialisma montvilaĝo.

Nia "Maljuna Ŝipestro"

ĜANG VENGIN estas estro de nia oleŝipo "Tiangin n-ro 1". Li estas spertoriĉa en navigacio, aplomba kaj kompetenta en okazo de danĝero kaj traktas ŝipanojn kiel siajn proprajn fratojn, tial ni ĉiuj respektas kaj amas lin. Kvankam li estas nur 40-jara, tamen oni nomas lin "maljuna ŝipestro".

Nu, ni prenu la endanĝeriĝon de nia ŝipo kiel ekzemplon. La afero okazis en iu tago de septembro, kiam nia ŝipo estis veturanta sur vasta maro. Subite ekblovis ventego je vespera krepuskiĝo. Pli kaj pli furiozis tiam la ventego kaj la ondegoj kvazaŭ montetoj sin ĵetis al nia ŝipo, kiu jen leviĝis sur ondopinto, jen falis en ondvalojn. Du novaj maristoj, kiuj unuafoje renkontis tiel furiozan maron, eksuferis jam marmalsanon. Proverbo diras: "Oni dependas de kompasoj en navigacio, kaj obeas ŝipestron je danĝero". En tiu momento nia maljuna ŝipestro firme staris en la stirejo kaj aplombe faris ordonojn, laŭ kiuj la ŝipanaro komencis obstinan batalon kontraŭ ventego kaj ondegoj.

Post dono de atentigo al dejora stiristo, la maljuna ŝipestro venis kune kun politika komisaro kaj unua maato al aliaj ŝipanoj. Vidinte en maŝinejo ke ĉiu streĉe persistas en sia laborposteno, la ŝipestro kontente kapjesis kaj varme kuraĝigis ilin: "Ŝtormbirdoj ŝatas flugi en ŝtormo, dum ni maristoj kuraĝas en veturado kontraŭ vento kaj ondoj. Nur se ni firme unuiĝas kaj brave batalas, la venko certe apartenos al ni!" En marista kajuto la ŝipestro kvazaŭ varmkora kaj zorgema flegistino fervore servis al la novaj maristoj kiuj suferis marmalsanon. Li portis al ili bolintan akvon, senŝeligis pomojn, kovris ilin per kovrilo, konsolis ilin bone ripozi kaj esti kuraĝaj en ŝtormo. Kvankam la maljuna ŝipestro poste jam foriris, tamen ŝajnis al ili ke li ankoraŭ restas ĉe ili. La batalo daŭris la tutan nokton kaj la danĝero estis fine venkita de ili sub la gvido de la maljuna ŝipestro.

Nelongan tempon mi laboris sur la ŝipo, tamen la ŝipestro donis al mi profundan impreson per liaj

agoj kaj vortoj. En la komenco mi plurfoje vizitis lian kabineton sed neniam trovis lin. Poste mi demandis malnovajn ŝipanojn pri la kialo, ili diris ridante: "Ĉu la maljuna ŝipestro? Vi povas trovi lin ne en kabinetoj, sed en maŝinejo aŭ kuirejo, eble en necesejo kie li ofte faras purigadon, ĉar li faras ĉiun bagatelan laboron." Nur post tio mi komprenis la devenon de la nomo "Ĉionfara servisto". Li laboras ne nur kiel ŝipestro sed ankaŭ kiel ordinara ŝipano. Ĉu en varma somero aŭ en neĝa vintro li ofte kune kun la ŝipanoj purigas ole-tubojn, lavas oletenejojn kaj faras diversajn aliajn laborojn. Se trookupateco estas en kuirejo, li do venas kun antaŭtuko en sia talio kaj falditaj manikoj por helpi prepari manĝaĵojn; se maŝinejo bezonas oleon, li do portas ĝin kune kun la ŝipanoj... Pro tio la ŝipanoj ŝerce diris al li: "Maljuna ŝipestro, vi estu servisto, ĉu bone?" Li respondis tamen serioze: "Se revolucio tion bezonas, mi volas fari la laboron dum mia tuta vivo!"

Krom tio, la maljuna ŝipestro ankaŭ konkurencas sur sin pezan kaj danĝeran laborojn. Foje, post longa vojaĝo nia ŝipo ankriĝis ĉe iu doko, neatendite ĝia helico estis volvita de kablo. Mankis tiam skafandristo, kaj ĉiu volis subakviĝi. La maljuna ŝipestro pensis en si, ke li kiel estro devas labori pli multe ol aliaj, precipe kiam tre lacaj estis la ŝipanoj post longa vojaĝo. Jen li ŝvingis al ili siajn manojn kaj kriis laŭte: "Lasu vin flanken kaj mi la unua!" Je tio li plonĝis en la maron. En aŭtuno la mara akvo estis ĝisoste malvarma. Rigardante la estigitajn ondojn sur la marsurfaco, ĉiuj sentis maltrankvilecon en sia koro. Tuj poste, la unua maato kaj pluraj maristoj saltis sinsekve en la maron por helpi la maljunan ŝipestron. Post pli ol unu horo ili elakviĝis. Tiam kuiristo alportis al ili varman zingibrosupon, kaj ŝipanoj metis sur ilin surtutojn. Subite iu ŝipano kriis: "Vi vundiĝis, ŝipestro!" La maljuna ŝipestro ĵetis sian rigardon al la sangmakulita piedo kaj diris ridante: "Nenio gravas, tio estas vundita de ostro."

Vidinte ke la ŝipestro ĉiutage laboris de mateno ĝis vespero, ĉiuj admonis lin: “Maljuna ŝipestro, vi devas malmulte uzi viajn manojn kaj plimulte vian buŝon por fari ordonojn!” Sed la vortoj tuj vekis ĉe li suferplenan rememoron. Li diris emociplene: “En la malnova socio, ni ŝipanoj penlaboris tutjare por kapitalistoj kaj ŝipestroj, sed ni devis sate suferi ilian ekspluatadon kaj subpremadon. Ili povis laŭplaĉe ordoni nin fari tion kaj ĉi tion, insultis kaj batis nin, se ni estis iomete malkontentigaj por ili. Sed kiu tiam donis simpatian al ni malriĉaj ŝipanoj? Nur ni ŝipanoj mem intimis kiel fratoj. Nun la socio tute aliĝis. Sub la gvido de Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio la popolo akiris venkon en revolucio kaj eliminis en Ĉinio la socisistemon en kiu homo ekspluatis homon. De tiam ankaŭ ni ŝipanoj ekhavis brilajn kaj feliĉajn tagojn. Ni ĉiuj ŝultroportas pezan taskon konstrui la socialisman patrolandon, tial ni devas daŭre revolucii kun la spirito ami kaj helpi unu alian kaj penlukti en malfacilo. Niaj labordividoj povas esti malsamaj, sed neniu rajtas ĝui privilegion pro tio.” Liaj vortoj tuj efikis, kvazaŭ varma fluo trakuris la korpon de la aliaj. Ili ĉiuj laŭdis ke li estas vera karulo de la ŝipanoj.

Ĉiu el ni ŝatas korverŝi kun la ŝipestro, se li renkontis nesolveblan problemon en ideologio kaj en laboro, kaj la lasta ĉiam donas fervoran helpon. En iuj tempoj lernanto-ŝipano Jang fariĝis malparolema kaj mallaborema. Post enketado la maljuna ŝipestro trovis la kaŭzon. Ĉar tiu opiniis, ke la laboro de ŝipano estas nur defroto de rusto kaj ĵeto de kablo, tre unutona kaj seninteresa. Pro tio la ŝipestro kune kun li laboris kaj lernis la artikolon “Servu al la Popolo” kaj aliajn verkojn de Prezidanto Maŭ, kaj plurfoje interparolis kun li por komprenigi al li ke la revoluciaj laboroj estas malsamaj nur en speco sed ne en nobleco kaj malnobleco. Dank’ al lia helpo la junulo akiris rapidan progreson en ideologio kaj decidis labori la tutan vivon sur la ŝipo.

La maljuna ŝipestro ofte diras: “La ŝtataj aferoj eĉ tre malgrandaj estas gravaj dum la privataj aferoj eĉ tre gravaj estas malgrandaj.” Tial, li ĉiam metas la revoluciajn interesojn super la privataj, kaj pli multe zorgas pri la kolektivo kaj la ŝipanoj ol pri si mem. En la komenco de la pasinta jaro, kiam li faris lekcion al lernantoj de “la kurso por mara navigacio”, li ricevis telegramon kun informo ke lia edzino enhospitaliĝis pro malsano



Ŝipestro Ĝang Vengin (meze)

kaj petis lin hejmenreveni. Tio tre maltrankviligis la maljunan ŝipestron. Sed li pensis, ke la kurso estis malfermita antaŭ nelonge, se li forirus, tio certe malhelpus la lernadon. Konsiderante pri tio li decidis resti kaj nur skribis leteron al sia edzino en kiu li faris necesajn aranĝojn al la hejmaj aferoj. Post nelonge nia ŝipo faris longan vojaĝon. Survoje la ŝipestro informiĝis ke la patro de iu ŝipano malsaniĝis, tio ĉiam maltrankviligis lin. Kiam nia ŝipo revenis, li tuj rapidis al la hejmo de la ŝipano por viziti lian patron. Tiu faro forte kortuŝis la familion.

En la pasintaj pli ol 20 jaroj la maljuna ŝipestro ĉiam pene kaj diligente laboras por la revolucio, tial ĉiuj ni prenas lin kiel lernindan ekzemplon. En la lastaj kelkaj jaroj, sub la gvido de la partia organizo kaj direktado de la maljuna ŝipestro, ni havis firman unuiĝon kaj venkis multajn malfacilojn kaj ĉiujare plenumis aŭ superplenumis la taskon asignitan de la ŝtato kaj fariĝis progresinta kolektivo en la martransporta branĉo.

Bredi Serpentkapajn Fiŝojn



EN bela kaj riĉa akvovilaĝo ĉe Dongting-lago de nia lando, oni kore laŭdas Jang Ŝuki "specialiston de bredado de serpentkapaj fiŝoj de la popolkomunumo".

Jang Ŝuki, kiu loĝas en la 5-a produkta taĉmento de Tubaŭ-brigado de Pufeng-komunumo, Juangiang-gubernio, Hunan-provinco, estas intelekta junulo diplomiginta el mezlernejo kaj reveninta al sia vilaĝo en la jaro 1967. Firme memorante la instruadon de Prezidanto Maŭ "**La kamparo estas vasta mondo, kie oni povas multon fari**", li decidis konstrui sian hejmvilaĝon en novan socialisman kamparon kune kun la lokaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.

En printempo de la jaro 1971, Jangĉjo informigis de kamaradoj de la aĉeta stacio por akvoproduktaĵoj, ke ĉe Dongting-lago produktiĝas serpentkapaj fiŝoj, kiujn ŝatas manĝi la lokanoj. La fiŝoj estas sovaĝaj, kiuj manĝas aliajn fiŝojn, kaj pro tio ricevis la nomon de fiŝtirano. Tamen en pasinteco oni nur kaptis sed neniu bredis ilin, tial ili malmultiĝis jaron post jaro. Por kontentigi la bezonon de la amasoj Jangĉjo pensis: Estas tre bone, se oni sukcese dresos tiujn sovaĝajn fiŝojn en la hejmbredatajn.

Jangĉjo diris sian opinion al kompartiano, maljuna brigadestro Hoŭ Ĝongguj. La lasta ĝoje diris: "Bona ideo, Ŝuki. Por revolucio vi devas esti kuraĝa en pensado kaj farado. Eksperimentu sentime! Se vi renkontos malfacilon, ni kune ĝin solvos." Sed, iuj aliaj diris: "La serpentkapaj fiŝoj estas sovaĝaj, kiel oni povas ilin bredi?"

Ĉu la sovaĝaj serpentkapaj fiŝoj vere ne povas esti dresitaj? En sia verko *Pri Kontraŭdiro* Prezidanto Maŭ montris: "**Ĉiuj kontraŭoj transformiĝas sub certaj kondiĉoj en sian malon.**" La instruo de Prezidanto Maŭ plivastigis pensojn

de Jangĉjo. Li pensis, ke en la mondo ne troviĝas objekto senŝanĝa, en certaj kondiĉoj sovaĝaj povas turniĝi en bredatajn. En pratempo oni eĉ ne havis familion, por ne paroli pri dombestoj kaj dombirdoj. Ĉu la hodiaŭaj bredataj kokoj, porkoj kaj bovoj ne estis longtempe dresitaj el sovaĝaj fare de laborantaj popolanoj en longtempaj praktikoj post kiam ili konis la karakterojn kaj vivleĝon de tiuj animaloj? Scio devenas de praktiko. Se oni kuraĝas en praktiko, esploras la leĝon kaj kreas certajn kondiĉojn, estos tute eble malsovaĝigi la serpentkapajn fiŝojn. Sub la direktado de la brila filozofia penso de Prezidanto Maŭ, Jangĉjo komencis la eksperimentadon pri dresado de serpentkapaj fiŝoj.

Por bredi la serpentkapajn fiŝojn, antaŭ ĉio oni devas solvi la problemon pri arta elkovado de fiŝidoj. Jangĉjo havis nenian sperton pri tio, sed li decidis lerni de tiuj, kiuj havas praktikajn spertojn. Post sia vizitado al pli ol 60 fiŝistoj de 7 fiŝvilaĝoj, li konis iujn vivkutimojn kaj ovometan leĝon de tiaj fiŝoj. Kiam li revenis al la brigado, li selektis 11 parojn da tiaj generaj fiŝoj kaj komencis la eksperimenton pri eloviĝado. Sed 10 el la 11 paroj mortis. Tiam la partifilia sekretario kuraĝigis Jangĉjon: "Ne timu la malsukceson! Kaj vi devas serioze el tio resumi sperton kaj ĉerpi lecionon. Vivas unu, vivos dekmil." La vortoj de la sekretario firmigis la memfidon de Jangĉjo pri venko super malfaciloj. Laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ "**Spertinte malsukceson, oni ĉerpas el ĝi lecionon kaj korektas siajn pensojn por ilin konformigi al leĝoj de la ekstera mondo, kaj tiel povas turni malsukceson en sukceson**", li serioze analizis la kaŭzon pri la malsukceso en eksperimentado, aplikis metodon bredi generajn fiŝojn aparte kaj antaŭrimedon kontraŭ malvarmo kaj malutilo por la fiŝejo. En la dua eksperimentado, 17 paroj da generaj fiŝoj sukcese elkovis 17 arojn da fiŝidoj.

Jangĉjo tre ĝojis pri tio. Tamen, post nelonge li trovis, ke la fiŝidoj malmultiĝis tagon post tago. Kien la fiŝidoj? Por solvi la enigmon Jangĉjo faris zorgeman observadon. Iutagmeze li vidis, ke iu granda fiŝino senmaĉe englutis fiŝidojn. Kial la fiŝino manĝis fiŝidojn? Kun tiu demando Jangĉjo konsultis iun veteranan fiŝiston. La lasta diris al li: Tio ne estas stranga, same kiel malsata porkino manĝas porkidon, la serpentkapaj fiŝinoj manĝas siajn idojn. Jangĉjo estis edifita de la vortoj. Poste li pesis la fiŝinojn kaj trovis, ke ili ĝenerale malpeziĝis. La kaŭzo kuŝas en tio, ke la metado de ovoj multe konsumis la forton de la fiŝinoj, se oni ne ĝustatempe ilin nutras aldone, ili do glutas fiŝidojn pro malsato. Trovinte tion, Jangĉjo ekbredis la fiŝinojn kaj fiŝidojn aparte, tiel ke la fiŝidoj estis sekurigataj kaj la fiŝinoj pli-multe nutrataj.


Por scii, kiujn nutraĵojn prenas la serpentkapaj fiŝoj, Jangĉjo sekcis kelkajn el la fiŝoj kaptitaj en malsamaj akvoj. Li trovis, ke la fiŝoj en lagoj kaj lagetoj ĉefe manĝas fiŝetojn, tiuj en fosaĵoj plejparte manĝas insektojn kaj salikoketojn, kaj tiuj en akvokampoj manĝas ranidojn kaj kobitidojn. Kvankam la grandeco kaj vivkondiĉoj de la serpentkapaj fiŝoj estas malsamaj, tamen ili ĉiuj ŝatas manĝi vivantaĵojn.

Post tio Jangĉjo serĉis fontojn de nutraĵoj por serpentkapaj fiŝoj. Li faris profundan enketadon kaj analizis la rilatojn dependajn inter akvo, herboj, insektoj kaj fiŝoj. En la lagetoj, kie kreskas ruĝaj trapoj kaj nigraj herboj, troviĝas nutra akvo, prosperaj herboj kaj multaj mikroboj. Tio liveras riĉajn nutraĵojn por insektoj kaj fiŝidoj, kiuj tamen estas bonaj nutraĵoj bezonataj de la serpentkapaj fiŝoj. Tial, en lagetoj Jangĉjo nutrigis la akvon, kulturis ruĝajn trapojn kaj nigrajn herbojn. Li nutris insektojn per la kulturitaj herboj, fiŝidojn per la insektoj kaj la serpentkapajn fiŝojn per alispecaj fiŝidoj.


En iu somera nokto, kiam Jangĉjo observis fiŝojn per elektra torĉo ĉe lageto, li trovis, ke la brila lumo de la torĉo allogis insektojn malsupren sur la akvosurfacon kaj ankaŭ la serpentkapaj fiŝaroj venis kaj plumbuŝe glutis la falintajn insektojn. Ekde tiam, en noktoj de ĉiu somero kaj aŭtuno, li instalas lampojn super la fiŝlageto por allogi insektojn.

Kvankam la nutraĵoj de la serpentkapaj fiŝoj estis fundamente solvitaj, tamen Jangĉjo trovis, ke li povis nur pasive sin konformigi al iliaj vivkondiĉoj, sed ne aktive reformi ilian sovaĝecon. Ekzemple, la serpentkapaj fiŝoj estas timemaj. Kiam ili vidis iometon da ombro aŭ aŭdis etan sonon, ili foren ekkuris. Pro tio iuj fiŝoj, kiuj renkontis la metitan nutraĵon, sate manĝis; kaj aliaj, kiuj ne renkontis la nutraĵon, ne havis ŝancon manĝi. Kaj de tio aperis denove la stato, ke grandaj fiŝoj manĝis malgrandajn fiŝojn. Kion fari? Ĉina proverbo diras: "Fiŝoj kutimas naĝi kontraŭ fluo kaj birdoj ŝatas flugi en arbaron." Utiligante tiun kutimon de fiŝoj, Jangĉjo dresis la fiŝojn per sonado, kiam li enfluigis la akvon en la lageton por allogi la serpentkapajn fiŝojn. En la komenco, aŭdinte la sonadon la fiŝaroj tuj foren ekkuris. Post ripetada dresado, la fiŝoj ne nur ne timis tion, sed ankaŭ konkure venis por manĝi en la sono. Pro akurata meto de nutraĵoj la serpentkapaj fiŝoj povas sate manĝi kaj facile grasiĝas.


Sub la direktado de la brila filozofia penso de Prezidanto Maŭ por scienca praktikado, Jang Ŝuki sukcese malsovaĝigis la serpentkapajn fiŝojn. En printempo de 1973, en kiu fondiĝis la grupo de fiŝbreda esplorado, la partia filio de la produkta brigado postenigis lin al la fiŝbredejo de la brigado kaj plivastigis la areon por breedi la fiŝojn. En la komenco la serpentkapaj kaj alispecaj fiŝoj estis bredataj en la komuna lageto. Ĉar la serpentkapaj fiŝoj manĝis la alispecajn fiŝojn, la produkto de lastaj malkreskis. Por solvi tiun kontraŭdiron, Jangĉjo kune kun la gejunuloj de la grupo foliumis iujn materialojn, vizitis vereranajn fiŝistojn kaj serioze observis ĉe la lageto. Ili trovis, ke kvankam la serpentkapaj fiŝoj glutis aliajn fiŝojn, tamen ili ne povis manĝi la fiŝojn pli grandajn ol ili mem. Ili opiniis, ke la kontraŭdiro estas utiligebla. Tial ili bredas pligrandajn alispecajn fiŝojn en la lageto, kie vivas malgrandaj serpentkapaj fiŝoj, kio favoras al plena utiligo de la akvosurfaco kaj nutraĵoj de la lageto. La serpentkapaj fiŝoj manĝas finsektojn, kiuj malutilas al alispecaj fiŝoj. La nutraĵ-ĉasado farata de la serpentkapaj fiŝoj plimultigas kuradon de la alispecaj fiŝoj, tiel ke la korpo de la lastaj plifortiĝis. Per tio ili kreis novan vojon por mikse breedi la du specojn de fiŝoj en komuna lageto.




Por pasigi la Printempan Feston mia patrino aĉetis novajn bovlojn, tamen mia patro elmontris la malgrandan fersitelon kiun li uzis por porti manĝaĵon en la malnova socio.



Li diris: "Antaŭ la Liberiĝo mi ĉiutage iris labori en iu elektrejo kunportante tiun sitelon."




Tiam por min vivteni mi devis labori eĉ en la Printempa Festo kaj varmigi mian manĝaĵon sur forĝitaĵo.



Tion rimarkinte la fremdlanda mastro de la fabriko forte piedpuŝis mian siteleton.



Nun nia vivo pliboniĝas. Kun novaj vestoj mi ĝoje pasigas kune kun miaj gepatroj la Printempan Feston.



Post la vespermanĝo mia patro postulis min skribi kritikan artikolon kaj sendi tiun siteleton al la ekspozicio por la klasa eduko.

"Trembrilanta Ruĝa Stelo"

Dongzi, membro de la Infana Korpuso





Dongzi kaptis bienulon Hu Hansan, kiu provis forfuĝi.

Patrino aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio. Dongzi diras al ŝi:
"Se vi apartenas al la Partio, panjo, mi do estas filo de la Partio."





Patro donas al Dongzi la trembrilantan ruĝan stelon.



Partia reprezentanto de la gerila taĉmento Onklo Vu tre zorgas kreskadon de Dongzi.



Por kolekti salojn por la gerilanoj



Akompanate de Avo Song, Dongzi veturas sur bambua flosa por akcepti novan taskon.



Atente aŭskulti paroladon de malamikoj



Rigardante la nordan stelon, la du kunbatalantetoj sopiras al Prezidanto Maŭ.



Haki Hu Hansan

Triumfa revidiĝo de patro kaj filo





Pan Dongzi fariĝis soldateto de la Ruĝa Armeo.

Pri la Infana Filmo

“TREMBRILANTA RUĜA STELO”

*Brilegas okulfrape l' ruĝa stelo,
Varmigas la brilanta ruĝa stelo.
Ĝi estas kor' de ni, la laboristoj, kamparanoj,
Kaj la Parti' lumigas nin antaŭen per la helo.*

Jen estas la tema kanto de la filmo *Trembrilanta Ruĝa Stelo*. La kolora rakonta filmo projekciita ekde la pasinta oktobro trovis bonan akcepton de vasta spektatoraro, precipe de infanoj. La ĉefa persono de la filmo Pan Dongzi jam fariĝis por infanoj lerninda heroeto, kaj ankaŭ lia batala historio memorigis multajn plenaĝulojn pri la pasinteco kaj vidigis ilin pri la estonteco. . .

La afero okazis en la komenco de la tridekaj jaroj de la kuranta jarcento, kiam la ĉina revolucio troviĝis en la plej malfacilaj jaroj.

Inter altaj montoj kun verda arbaro subite eksonis maldensaj pafoj, kiuj surprizis iun knabon hakantan brullignon. Li rapide grimpis sur la arbon, rigardis malproksimen, kaj sur lia buŝo ekaperis rideto. La knabo ja estas la heroo de la filmo Pan Dongzi, ĉirkaŭ 7-8-jara. Antaŭ nelonge li informiĝis de plenaĝuloj, ke la Ruĝa Armeo gvidata de la Kompartio kaj Prezidanto Maŭ jam atingis la Sudan Monton. Nun, li, la filo de malriĉulo, aŭskultas la proksimiĝantajn pafojn kaj sopiras la baldaŭan alvenon de la Ruĝa Armeo.

La pafoj konsternis Hu Hansan, tiranon de la hejmloko de Pan Dongzi. Li haste kolektas riĉaĵojn en paniko por forkuro. Jen li renkontis Dongzi vektoportantan brullignon. Por pride-mandi Dongzi, kien iris lia patro, Hu Hansan eĉ pendigis la lastan sur arbo per ŝnuro kaj forte vipas lin. Ĝuste tiam iu trupo de la Ruĝa Armeo komandata de Vu Hiuĝu kaj kondukata de la patro de Dongzi sturmis en la vilaĝon. Vu Hiuĝu levis tranĉilegon kaj dishakis la ŝnuron. “Ĉiam memoru, ke la trupo gvidata de Prezidanto Maŭ savis vin!”


La vortoj de la patro profunde gravuriĝis en la junan koron de Dongzi. Li rigardas la kristale trembrilantan ruĝan stelon sur la ĉapelo de Vu Hiuĝu kaj ekligis sian sorton kun la Laborista-Kamparana Ruĝa Armeo.

Jen aperas sur la ekrano gaja sceno: La popolanoj de Liuhi celebras sian liberigon, paradigas tiranon Hu Hansan sub eskorto sur strato kaj starigas la Laboristan-Kamparanan Demokratian Registaron. La suferplenaj popolanoj ekvivis ĝojan vivon. Ankaŭ malgranda Dongzi ĝoje iras viziti lernejon, kun okangula ĉapelo sur la kapo, ruĝa kravato ĉirkaŭ la kolo kaj ruĝkvasta lanco sur la ŝultro.

Revenante de la lernejo, Dongzi kune kun siaj amiketoj ludas survoje “kapti tiranon” kaj ne-tendite rimarkis forkurantan Hu Hansan. Dongzi tiam ĵetas al li lancon kaj luktas kun li per pugnoj. Kvankam Hu fine forkuris, tamen la filmo per tiu neordinara aranĝo vivece esprimis la sentiman heroecon de Dongzi, kiu ne timas fortan malamikon.

En iu batalo lia patro, estro de la Ruĝa Gvardio, vundiĝis kaj multe sangis. Vidinte tion, Dongzi esprimis kun larmoj ke li nepre venĝos por la patro. La patro kaj onklo Vu diras al li, ke ruĝa armeano batalas ne por venĝi sin mem, sed por ekstermi ĉiujn blankajn hundojn (t.e. kontraŭrevoluciaj armistaj fortoj de Ĉiang Kajŝek) kaj liberigi la suferplenajn popolanojn de la tuta Ĉinio. Dongzi tiam firme tenas la kuglon prenitane el la kruro de lia patro kaj la penso batali por la tuta klaso ekĝermis en lia koro.

Post nelonge, la patro de Dongzi devas sekvi la ĉefan trupon de la Ruĝa Armeo al malproksima loko. Estis la jaro 1934. Vang Ming, kiu fariĝis poste renegato, naciperfidulo kaj mortis en 1973, uzurpis la gvidantecon de la Partio kaj la Ruĝa



Armeo, praktikis oportunisman linion, rifuzis la ĝustan gvidon de Prezidanto Maŭ, kaj pro tio la Ruĝa Armeo ne povis disrompi la kvinan “ĉirkaŭ-ekstermon” faritan de Ĉiang Kajŝek kaj devis forlasi la centran bazlokon kaj komencis la fame konatan Longan Marŝon de 25,000 lioj, pri ĉio ĉi tio ankoraŭ ne komprenis tiam la malgranda Dongzi.

En la neforgesebla nokto, antaŭ sia forlaso de la hejmloko, la patro donis al Dongzi unu trembrilantan ruĝan stelon. Dongzi diras al la patro: “Paĉjo, post kiam vi foriros, mi kreskos kiel eble plej rapide kaj ankaŭ mi tiam metos la ruĝan stelon sur mian ĉapelon kaj estos ruĝa armeano.”

Nia malgranda heroo kreskas en vento kaj ondoj de klasbatalo, kaj liaj klaraj amo kaj malamo kaj braveco en batalo lumigas homojn kvazaŭ la trembrilanta ruĝa stelo.

Foriris la Ruĝa Armeo, revenis Hu Hansan kaj restaŭriĝis la regado de la klasa malamiko. En blanka teroro, Dongzi kaj lia patrino devas sin kaŝi kaj persistas en batalado en profunda montaro. En la plej malfacila momento, la patrino aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio. En la solena ĵurceremonio, ankaŭ Dongzi imitante sian patrinon levas sian kunpremitan pugnon kaj diras poste: “Vi apartenas al la Partio, panjo, mi do estas filo de la Partio!” “Kion la Partio ordonas, tion mi certe plenumas!” Per sia agado, Dongzi plenumis sian ĵuron.

De tiam, Dongzi kune kun sia patrino plenumas taskojn donitajn de la Partio. En januaro de 1935, la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio okazigis sesion en Zunji de Gujĝoŭ sur la vojo de la Longa Marŝo, en kiu oni likvidis la erarojn de la linio de Vang Ming kaj starigis la gvidantecon de kamarado Maŭ Zedong super la Partio kaj la Ruĝa Armeo. La patrino kaj la filo venis al Liuhi por konigi al la tieaj popolanoj la ĝojigan aferon pri okazigo de la sesio kaj instrukcion de la Centra Komitato de la Partio pri disvolvo de gerila milito kaj forta bato al malamikoj.

Estis tre bedaŭrinde, ke en iu fojo ili renkontis la blankajn hundojn kaj la patrino brave sin oferis por protekti la amasojn.

Foriris la patro, mortis la patrino, sed pli firma fariĝis la malgranda Dongzi kiu spertis seriozajn provojn. Li kun la trembrilanta ruĝa stelo aliĝis al la gerila taĉmento gvidata de Vu Hiuĝu. Kaj en tiu revolucia forno li rapide kreskas.

Hu Hansan blokis la monton, tio kaŭzis grandan malfacilon al gerilanoj en ricevo de greno kaj salo. Onklo Vu aldonis iom da salo en la supon kun sovaĝaj legomoj de Dongzi. Tion rimarkinte Dongzi senhezite verŝis sian supon en la kolektivon kal-dronon. La soldato amzorge almetis sur lian kovrilon sian vatitan veston, kaj li rimarkis tion post sia vekigo kaj senbrue metis ĝin sur la ŝultrojn de la gardstaranto. . .

La filmo ankaŭ donas apartan scenon por rakonti kiel la malgranda Dongzi kolektas salon por gerilanoj.

Alivestante sin kiel malgrandan bambuplek-tiston Dongzi sekvis Avon Song al urbeto Jaŭvanĝen por kolekti salon. Sur la revena vojo ili renkontis blankajn hundojn ĉe pasejo de la urbeto. Dongzi tiam sagace solvis la salon en akvon kaj verŝis ĝin en sian vatitan veston, kaj tiamaniere ili sukcese trapasis la pasejon.

Poste Dongzi estis taskita eniri en la urbeton Jaŭvanĝen kiel metilernanto de rizvendejo Maŭjuan por kolekti informojn pri malamikoj.

Je tio, la scenaristoj kaj reĝisoro donas al la heroeto lirikan scenon, kaj sur la ekrano aperas bela pejzaĝo: verda akvo torentas inter la densa verda bambuaro, kaj sur la rivero fluas malgranda bambufloso tra torenta akvo kaj danĝeraj rifoj. Sur la floso, Avo Song puŝas la flosan per hokstango kaj malgranda Dongzi tenas sur siaj

ambaŭ manoj karan ruĝan stelon. Kaj tiam en la aero flugas brava aglo kaj eksonas alttona kanto esprimanta la senton de Dongzi en la momento:


*Flugilojn siajn l' agl' etendas en la firmamento,
Spite al furioza pluvo kaj giganta vento.
Ho, l' trembrilanta ruĝa stelo kara
Lumigas al batalo l' vojon mian.
La novaj revoluciuloj kiel siaj patroj
La Kompartion sekvas ja por ĉiam.*

La mastro de la rizvendejo Maŭjuan estas fikomercisto kiu speciale kolektas militan grenon por kuomintanga trupo. Por fari batalon en tiu ĉi aparta batalejo oni bezonas kuraĝon kaj saĝon. Nokte, Dongzi kun sia amiketo Ĉun Jazi refoje tenas la ruĝan stelon en siaj ambaŭ manoj kaj rigardas ĉe la fenestro la nordan stelon, kaj iliaj imagajflugiloj jam alportis ilin al la revolucia sanktejo Jan-an kaj Prezidanto Maŭ. La batalantetoj kunligis sian batalon en malamikaj lokoj kun la tutlanda revolucio. Jen tio estas la fonto de iliaj fortoj kaj saĝo.

En la vendejo estas monto da greno, tamen la mastro ne vendas ĝin. Ĉar li konspiras kun Hu Hansan, komandanto de la t.n. Packonserva Korpuso, kaj pretas ŝtele transporti la grenon al blankaj hundoj por ekstermi gerilanojn. Dongzi ĝustatempe transsendis la informon ke la malamikoj plejparte eliris por ekstermi gerilanojn kaj interne de la urbeto restas malmultaj, kaj aliskribis

Dongzi kune kun sia patrino ŝtele iras al Liuhi por propagandi la spiriton de la sesio de Zunji.

Fariĝinte vera ruĝarmeano Dongzi estas irona al nova batalo.



“hodiaŭ sen greno” per “hodiaŭ vendi grenon” sur la montrotabulo. Per tio li levis grenokaptan batalon en la urbeto kaj detruis la planon de Hu Hansan por ekstermi gerilanojn.

La plej alta tajdo de la filmo estas refoja renkontiĝo de Pan Dongzi kun Hu Hansan en la rizvendejo.

En la bankedo aranĝita de la mastro de la rizvendejo por Hu Hansan, la lasta ekdubis pri la servisteto. Li faras plurfojn provojn kaj demandojn, sed pri ĉiuj demandoj aplombe respondas Dongzi. Kaj kiam Dongzi portis varman akvon al li en dormĉambron, li kvazaŭ ebria kaptis Dongzi kaj eldiris la veran nomon kaj devenon de Dongzi. Sed la jam kreskinta Pan Dongzi refoje venkis kun la helpo de Ĉun Jazi tiun ĉi ruzan malamikon. Poste, Dongzi sendis Ĉun Jazi al gerilanoj kun letero kaj li mem kun oleujo en mano kaj tranĉilo kaŝita en taliozono eniris en la dormĉambron de Hu Hansan. Kiam la lasta jam morte dormis, Dongzi bruligis la ĉambron kaj en la nomo de soldato de la Ruĝa Armeo mortigis per tranĉilo tiun ĉi ferocan malamikon de malriĉaj popolamasoj.

Gerilanoj liberigis la urbeton Jaŭvanĝen kaj rekaptis la venkan frukton el la manoj de blankaj hundoj. Post nelonge, la patro de Dongzi revenis al sia hejmloko asignite de la Partio por bonvenigi la gerilanojn persiste batalantajn en la sudo de

Jangzi-rivero al batalfronto kontraŭ japanaj agre-santoj. Tiam Pan Dongzi, kiu marŝas apud sia patro kaj inter la trupo de gerilanoj, estas jam ne naiva infano, sed revolucia batalanto de la proletaro. Kaj la ruĝa stelo sur lia milita ĉapelo brilas en la lumo de la suno.

La filmo *Trembrilanta Ruĝa Stelo* adaptita laŭ la samtitola novelo estas elstara filmo plena de revolucia emocio. Ĝi ne nur rakontas kortuŝan revolucian historian rakonton sed ankaŭ sukcese modlis en la tipa cirkonstancaro de akra batalo inter la du klasoj kaj la du linioj amindan figuron de revolucia heroeto. La filmo uzis diversajn apartajn esprimmanierojn de kino, tiel ke elstariĝis la temo, kaj profundan impreson donis la figuroj kaj pensoj de la herooj. Dank’ al tio la filmo ricevis relative bonan artan efikon. Tio rezultis de tio ke la scenaristoj kaj reĝisoro serioze lernis la kreaĵon sperton de la revoluciaj modelaj teatraĵoj naskiĝintaj en la Granda Proleta Kultura Revolucio, kaj ankaŭ de la sukcesa prezentado de la 11-jara aktoreto Ĝu Hinjun.

Ĝu Hinjun estas filo de korpokultura instruisto de iu mezlernejo de Pekino, kaj ankoraŭ elementa lernanto kiam li ludis la rolon. Kvakam li renkontis multajn malfaciojn, tamen li fine sukcesis en ludado de la rolo sur ekrano dank’ al sia diligenteco. Pri tio oni legu nian artikolon “Kiel mi ludis la rolon de Dongzi” en ĉi tiu numero.



NOVA RADIOTELESKOPO DE NIA LANDO

Nia lando sukcesis prove fabrikigi novan radioteleskopon, nome 450-megaherca rekombinan interferometron, per kiu oni povas observi la sunon kun alta distingpovo. De 1972 laboristoj, kadroj kaj scienc esploraj laborantoj de la Pekina Observa-

torio de la Ĉina Akademio de Sciencoj komencis provfari tian teleskopon kaj en decembro de 1974 kompletigis la laborojn de ĝiaj reguligo kaj provado, kaj oni observis per ĝi la sunon kaj plurajn kosmajn radiofontojn. La observado montris, ke la ĉefaj postuloj de la projektado kiel la distingpovo, atingita distanco kaj sentemo de la radioteleskopo estis atingitaj. Kunage kun aliaj sunobservaj aparatoj ĝi povas fari relative kompletan observadon kaj kontrolon al la suno, kio liveris bazan materialon por antaŭinformi pri aktivado de la suno kaj fari fizikan esploron de la suno kaj provizis novan rimedon por observado en la venonta pintjaro de suna aktivado.

Kiel Mi Ludis la Rolon de Dongzi

DE kiam la filmo *Trembrilanta Ruĝa Stelo* komencis esti prezentata, oni tre zorgas min kaj volas scii, kiel mi ludis la rolon de Dongzi. Fakte, mi ankoraŭ estas tre malmulte scia kaj nur lernis de Dongzi ludante lian rolon, sub la helpado de geonkloj ĈPLA-anoj.

Kiam mi venis en la jaro 1973 al la Filmofarejo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo "Unua de Aŭgusto", mi estis apenaŭ dekjara. Kiam mi eksciis ke mi ludos la ĉefan rolon de Dongzi, mi vere tre maltrankviliĝis, ne sciante, kiel mi faru. Tiam, gvidanto de la filmofarejo kunvokis nin kelkajn knabojn kaj diris al ni: "Ĉifoje vi filmoludos, kaj tio estas la batala tasko al vi donita de la Partio. Vi devas aŭskulti vortojn de la Partio kaj peni bone plenumi ĝin kiel Dongzi." Tuj sekve, li rakontis al ni la historion de Dongzi. Samtempe li donis al ni bildrakonton "Trembrilanta Ruĝa Stelo" por ke ni ĝin rigardu. Mi iom post iom eksciis ke Dongzi estas eksterordinara malgranda heroo, kaj mi pensis en mi: Kiel bone estos, se mi povos bone ludi la rolon de Dongzi, por ke multaj knaboj povu lerni de li kaj fariĝi bonaj knaboj de la Partio same kiel li.

Mi ekstreme amas Dongzi kaj decidis plenkore bone ludi la rolon. Sed tre malfacile estis bone efektiviĝi tion. Dongzi estis knabo vivinta en kamparo de la malnova socio, kiu povas hakkolekti brulaĵon en montoj kaj grimpi sur arbon, kaj iam hakfendis brullignon kaj laboris por la mastro de rizbutiko. Tamen mi naskiĝis en la nova socio, loĝas en la urbo Pekino, kaj kiel la plej juna infano el mia familio, mi ne kapablis fari tion, kion faris Dongzi. Kion fari? Lerni de Dongzi! Dongzi estis membro de la Infana Korpuso, dum mi estas ruĝgvardiano. Ni ambaŭ estas knaboj de la Partio. Mi nepre lernos ĉion, kion kapablis Dongzi.

Mia unua leciono estas lerni hakfendi brullignon. La reĝisoro diris al mi: "Hakilo estas armilo de Dongzi por batali kontraŭ la malamikoj, vi nepre devas ne nur ellerni haki, sed plie haki lerte kaj forte." Laŭ la hakmaniero instruita al mi de geonkloj, mi tutforte hakis sur dika arbostumpo. Post dekelkaj minutoj, doloris al mi la du brakoj. La onkloj kaj onkloj konsilis min iom ripozi. Mi pensis: Kiam Dongzi kaj onkloj ruĝarmeanoj estis sieĝitaj sur la montoj, estis tre malfacile eĉ akiri iom da salo. Kiam onklo Vu demandis lin: "Ĉu vi sentas la vivon amara?" La lasta respondis:

Aktoreto Ĝu Hinjun



“Jes, sed mi ne timas ĝin!” Por lerni de Dongzi, mi devas ankaŭ ne timi malfacilon. Tiel mi ĉiutage persistis en hakfendado de brulligno sub la brila suno por kiel eble plej rapide ellerni la teknikon de lignofendado kaj samtempe iom sunbrunigi mian haŭton (ĉar mia haŭto estis kompare blanka) kaj ekzercante persiste mi fine sukcesis.

Por lerni fendadon kaj vektoportadon de brulaĵo, la onkloj ofte kondukis nin al la kamparo por lerni de tieaj knaboj. Ĉiu el ili de la kamparo povas vektoporti du grandajn ligaĵojn da brulaĵoj, dum mi nur du malgrandajn faskojn. Kiam la vekto pezis sur mian ŝultron, la ambaŭ faskoj skuis tien reen kaj nekapteble eĉ per la manoj. Portinte unu fojon mia ŝultro jam ruĝiĝis. Sed ekpensante ke Dongzi ne timas malfacilojn, ankaŭ mi ektimis nenion. En lernado de arbogrimpado kaj veturo per bambufloro kaj en fotado de scenoj en tre malproksimaj lokoj, mi ĉiam kuraĝigis min per lerno de Dongzi en maltimeco!

La filmado estis baldaŭ komencota, mi renkontis alian malfacilon — mi estas tro grasa. Dongzi estas knabo de malriĉa familio de la malnova socio, ne havante sufiĉan manĝaĵon por ŝtopi sian stomakon kaj devigate multe laboregi. Mi vivas ja en la nova socialisma Ĉinio kaj estas sufiĉe grasa pro bona nutrado. La fotisto diri: “Kiu ludas la rolon de Dongzi, devas esti kompare malgrasa kiel li.” Kiel oni povas malgrasigi sin? Mi iam aŭdis ke por tio oni devas eviti la manĝadon de viando. Sed mi plej ŝatas manĝi viandon. Kion fari? Ankaŭ lerni de Dongzi! Ĉu Dongzi origine ne volis fariĝi gerilano por batali kontraŭ la malamiko kun kune kun onklo Vu? Sed li aŭskultis la vorton de la Partio kaj kune kun avo Song iris kolekti salon por gerilanoj. Poste li venis al rizbutiko por labori kiel “metilernanto”. Li diris: “Mi estas filo de la Partio, mi faros ĉion kion la Partio bezonas.” Ankaŭ mi estas filo de la Partio kaj ankaŭ mi devas aŭskulti la vorton de la Partio kiel Dongzi. Filmoludo bezonas min fariĝi malgrasa, mi do nepre devas malgrasiĝi! De tiam, en duonjaro de filmoludo mi ne manĝis viandon.

Kvankam malfacile estas lerni la agojn de Dongzi, tamen ankoraŭ pli malfacile posedi lian sentimenton! Ĉar mi ne suferis la mizeron, kiun Dongzi spertis kaj tial en la komenco de ludado, mi ĉiam ne povis havi lian sentimenton. Ekzemple, en la unua sceno, kiam Dongzi unuafoje vidis onklojn ruĝarmeanojn, mi nur povis ridi. Ĉar mi amas la onklojn ĈPLA-anojn kaj ĉiam ĝojas kiam mi vidas ilin en ordinara

tago. Plie en la sceno de la “Ofero de la Patrino”, kiam reĝisoro kaj onklino direktanto edifis min ekplori, mi tamen neniel povis plori vizaĝe al fotografilo. Post tio, la onkloj kaj onkloj de la fotografia grupo ĉiuj diris ke mia sento ne penetris en tiun de la persono en la teatraĵo. Poste ili rakontadis al mi, foje kaj refoje edifante min kompreni la sentimenton de Dongzi. Post tre longa tempo, mi komencis kompreni la sentimenton de Dongzi: Se la ruĝarmeanoj ne venus al Liuhi, do Dongzi mortus pro bato de la bienulo Hu Hansan. Tial kiam la ruĝarmeano onklo Vu hakrompis la ŝnuron per kiu la bienulo pendigis “min” sur arbo, mi elverŝis varmajn larmojn kaj ĵetis min en la brakojn de onklo Vu kaj ne plu ridis. Same, en la sceno de la “Ofero de la Patrino”, mi sciis ke se la patrino ne ŝirmus la amasojn, do multaj el ili estus mortigitaj kaj vunditaj de Hu Hansan kaj la blankaj hundoj. La patrino estis bona patrino kaj membrino de la Partio, sed ŝi estis brulmortigita de Hu Hansan kaj mi neniam plu vidos ŝin, kiel “mi” povus ne malĝoji? Pensante ke kiom da tiel bonaj patrinoj oferis heroe sian vivon por nia feliĉa hodiaŭo, mi havas multon por eldiri. Kiam mi diris ke “Patrino estas bona membrino de la Partio, kiu nepre ne lasas la amasojn en danĝeron — tio estis vorto de mia patrino”, larmoj nature torentis el miaj okuloj kaj samtempe sparkis el ili venĝaj fajreroj.

El ĉiu sceno, mi ricevis profundan klasan edukon. Post finfilmo, mi pli bone scias, kiun mi amu kaj kiun malamam, de kiu ni ricevis feliĉon kaj kiun ni sekvu. Sub la direktado de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, la popolo de Liuhi kaj la familio de Dongzi liberiĝis kiel la aliaj de la tuta lando. Hodiaŭ en la movado de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio, ni ruĝgvardianoj devas same kiel la tutlanda popolo firme efektiviĝi kaj protekti la revolucion linion de Prezidanto Maŭ, profunde kritiki la reviziisman linion de Lin Biaŭ kaj absolute ne permesi al Hu Hansan kaj aliaj fiuloj fari kontraŭ-revolucion restaŭron.

Mi lernis de Dongzi ludante lian rolon, kaj mi devas lerni de li ankaŭ post la ludado de lia rolo. Post prezento de la filmo, multaj onkloj, onkloj kaj malgrandaj amikoj skribis al mi salutajn leterojn. Mi estas nur ordinara ruĝgvardiano. Farinte ian laboron por la Partio, mi ricevis tiel grandan prizorgon de la Partio kaj la popolo. Mi decidis sekvi la instruon de Prezidanto Maŭ **diligente lerni kaj progresi kun ĉiu tago**, iri la vojon, kiun iris Dongzi, kaj fariĝi bona filo de la Partio.

Mia Kuzo Erjong

(Infana Literaturaĵo)

EN la lasta aŭtuno, miaj gepatroj sendis min al la domo de mia avino, konsiderante ke tio ebligas al ili pli bone labori kaj utilos al mia kreskado. En la sekvanta tago post mia alveno, la avo diris al mi karesante mian kapon: “Sanhuaner, ne faru petolaĵojn, forestante de la gepatroj. Depost hodiaŭ, vi vizitu lernejon kune kun via kuzo Erjong. Via kuzo estas bona knabo.”

Mi ekmontris la langon kun rideto kaj ĵetis rigardon al mia kuzo Erjong. Li ne respondis mian ridon sed diris serioze: “Estante jam lernanto de la kvarjara klaso, vi devas bone lerni por la revolucio.” Aŭdinte lian diron kaj vidinte lian mienon, mi mallevis la palpebrojn kaj flanken turnis mian vizaĝon. Mi pensis: Ĉu mi bezonas vian admonon! Apenaŭ fariĝinte mezlernejano, vi jam vin tenas kvazaŭ plenaĝulo kaj paradas per veteraneco.

Tamen kelkaj okazaĵoj min fine konvinkiĝis, ke mia kuzo Erjong estas vere kapabla.

Iun tagmezon, la knabino kun du harligoj Ĉunnju kuris en la domon de mia avino. Apenaŭ transpaŝinte la sojlon ŝi jam diris al mia kuzo kvazaŭ maŝinpafilo: “Nia grupo ja decidis, ke Tietoŭ faru paroladon posttagmeze en la kunveno por kritiki Lin Biaŭ kaj Konfucion, sed en tiu ĉi ŝlosila momento li eksuferis ventrodoloron, do vi tuj skribu paroladon!”

Tuj skribi? Ja ne tiel facile, verki ja estas afero tre kaprompa! Tamen mia kuzo Erjong ne hezitis nek kuntiris la brovojn kaj tuj konsentis dirante: “Bone, mi skribu tagmeze.” Tro kuraĝa estis mia kuzo, ĉar la kunveno de la lernejo okazos je la 14-a kaj tiam estis tuj batonta la 12-a; la plumo devus havi flugilojn.

“Kuzo, vi tuj akceptis la taskon je urĝa sciigo, kion fari do, se vi tamen ne plenumos ĝin ĝustatempe?”

“Ne plenumi ĝin ĝustatempe estas nepermeze!” serioze diris mia kuzo. “La invadantaj malamikoj ja neniam antaŭe anoncis sian alvenon,

sed ĉiufoje la onkloj ĈPLA-anoj brile venkis ilin. Ankaŭ lernado estas batalo, kaj ni devas pene nin ekzerci!”

Li deprenis la fontopluman ĉapon, prove faris strekojn ĉe angulo de paperpeco kaj vidinte ke estis inko, li tuj susure skribis la titolon “Forte Kritiku la Tezon ‘Lernado Estas Senutila’”.

Li skribadis pensante kaj vere finis la verkon je 50 minutoj post la 13-a. En la posttagmeza kritika kunveno, la parolado de mia kuzo Erjong vekis foje kaj refoje indignajn sloganojn kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio; post la kunveno, la Propaganda Grupo aperigis lian paroladon sur la nigra-tabula gazeto.

Estas ne mirinde ke ĉiuj diris ke mia kuzo estas bona, ĉar li lertas en verkado. Kontraŭe al li, mi timis verkadon. Mi decidis peti lin vespere, ke li konigu al mi sian ŝlosilon de verkado.

Sed kiam ni ankoraŭ ne finis la vespermanĝon, la onklo librotenisto loĝanta najbare de ni en la okcidento jam kriis trans la ĉirkaŭmuro: “Erjong, okaze de dividado post la aŭtuna rikolto, vi helpu min en kalkulado! Kaj krome mi ekzamenu vin!”

“Bone, mi tuj venos!” Vidu, mia kuzo Erjong vere estas kiel ĵus naskita bovido, kiu ne timas tigron. Li formetis la manĝbovlon, viŝis la buŝon, metis piloĵojn en la elektran torĉon kaj elkuris. Vera kalkulado de kontoj ja ne estas lerneja ekzerco! La onklo librotenisto agis tro senzorge, kiel li povis lasi knabon helpi en kalkulado de kontoj de produkta brigado! Post la vespermanĝo, ankaŭ mi iris kun dubemo al la hejmo de mia onklo. Irinte en la pordon mi tuj rimarkis, ke sur la terlito staris manĝtablo, antaŭ la onklo kuŝis du kajeregoj kaj ĉe la mano de mia kuzo Erjong kuŝis abako. Sidante unu kontraŭ la alia la onklo kaj kuzo jam komencis kalkuli. Mia onklo voĉlegis artikolon post artikolo, kaj mia kuzo klake manipulis la abakon, trankvile kaj lerte, sen murmura recitado de abako-kalkulaj formuloj.

Rigardante la energie laborantan Erjong, la onklo librotenisto pleniĝis de ĝojo kaj lin laŭdis: “Brava knabo, vi taŭgas.”

Post la fino de la kalkulado, mi proksimiĝis al mia kuzo Erjong kaj diris: “Vi lertas ne nur en verkado, sed ankaŭ en kalkulado, vere ne ordinare!”

“Nenio eksterordinara. Mi faris nur tion, kion la instruisto instruis al mi kaj kion mi ekzercis sub la zorgo de la onklo.” Tion dirante mia kuzo descendis de sur la terlito.

“Erjong,” haste vokis mia onklino vidante ke ni volis foriri, “preterpasante la muelejon, vi portu al la avino de kvin garantioj* la farunon, kiun mi preparis por ŝi posttagmeze.”

“Tre bone, ĉar hodiaŭ mi tien ankoraŭ ne iris dum la tuta tago,” senhezite diris mia kuzo Erjong.

“Sanhuan-er, ankaŭ vi ne restu senfara, prenu tion ĉi por porti tritikan branon.” Tion dirante ŝi donis al mi ventumkorbon.

La muelejo troviĝas oblikve kontraŭ la domo de la onklo librotenisto kaj fore de ĝi kelkajn paŝojn. Apenaŭ la deĵoranta onklino trovis la farunsakon de la avino de kvin garantioj, la maŝino subite haltis.

“Manĝo de salo en soifo, jen tio en urĝa bezono!” diris la deĵoranta onklino malpacience.

“Tute senkaŭze difektiĝis la maŝino!” mi diris.

“Eble ne difektiĝis la maŝino. Ĉu vi ne vidas, ke ne lumas la elektraĵ lampoj?”

“Certe interrompiĝis la kurento,” mi tuj korektis min.

“Ne, la megafono funkcias.” Tion dirante Erjong elprenis la elektran torĉon, saltis sur altan

benketon por ekzameni la skatolon interligitan kun la elektraĵ fadenoj. Mi alrapidis por firme teni la benketon por li, sed li ekturis sin kaj “pum!” — li jam saltis malsupren.

“Sanhuan-er, iom atendu!” Tion dirante li formalaperis. Mi pensis, ke li certe iris por alvoki elektran laboriston.

Post palpebruma momento, li fluge revenis kvazaŭ ciklono. Ankoraŭ li sola, sed en liaj manoj aldoniĝis ŝraŭboturnilo.

“Kio okazis, kuzo?” mi demandis scivoleme.

“Rompiĝis la fandodrato, kaj ŝanĝo de ĝi solvos la problemon.” Tion dirante li donis al mi la elektran torĉon. “Lumigu por mi.” Li tuj saltis sur la altan benketon. Lumigante la skatolon per la elektra torĉo, mi rigardadis kun levita kapo. Mi ne klare vidis kiel li manipulis kaj li jam diris: “Riparite.” Li puŝis la blankan porcelanan tenilon. Ho, la elektraĵ lampoj tuj ekbrilis kaj la maŝino ekbruis.

“Sanhuan-er, rigardu vian kuzon, li ja ne vane vizitis lernejon!” Tre ĝojiĝis la onklino laboranta en la muelejo.

Vidinte ke mia kuzo saltis malsupren, mi tuj ĉirkaŭbrakis lin kaj diris:

“Mirinde kapabla vi estas, kuzo Jongĉjo; vi scipovas verki, kalkuli kaj labori!”

“Kio mirinda? Tion mi lernis en lecionoj pri industriaĵ scioj kaj krome la elektristo de la brigado instruis min pri tio, ĉu mi ankoraŭ restu nescipovanta?”

Kvankam ankoraŭ juna, mia kuzo Erjong tamen sufiĉe kapablas. Mi elkore admiras lin.

“Kuzo Erjong, vere genia vi estas. Ĉion kion vi lernis, vi povas apliki en praktiko.”

“Nur dank’ al diligenta lernado kaj ekzercado kaj multa praktikado! La babilaĵo pri genio estas nur sensencaĵo de ideisma transcendentalismo. La asertoj de Lin Biaŭ kaj Konfucio pri sorto kaj genio estas nur absurda babilaĉo!”

Kial mia kuzo Erjong akiris tiel grandan sukceson en lernado? Mi nepre klopodos por solvi tiun enigmon.

Iun dimanĉon, pluvadis. Mia avo eliris kaj mia avino flikis jutsakojn de la produkta taĉmento por enteni impostan grenon.



“Kuzo Erjong, ne povante eliri pro la pluvo, ni lernu.” Mi tre deziris vidi la ŝlosilan metodon de mia kuzo en lernado.

“Ĉu pluvo povas nin bari? Ni iru al la stalo.” Tiuj vortoj de Erjong memorigis al mi, ke en la lastaj tagoj, kiam mi iris ludi kun Sikiang post lernado, li iradis ludi en la stalo. Eble tie troviĝas io interesa. Mi ĵetis rigardon al la pluvo ekster la fenestro kaj diris: “Mi ankoraŭ devas fari hejman taskon.”



“Ĝin faru vespere.” Tion dirante li donis al mi pluvmantelon kaj ekkuris tirante min je la mano.

Sufiĉe malvarma estis la aŭtuna pluvo kaj mi retiradis la kolon pro la malvarmo. “Vi devigas min kuniri por vin akompani en la pluvo!” mi grumblis dum la kurado. Mia kuzo Erjong diris nenion, kvazaŭ tute ne aŭdinte min, kaj li kuris ankoraŭ pli rapide kuntrenante min.

Atinginte la stalon, mi vidis onklon Ĝaŭ.

“Ho, eĉ la pluvo ne povas vin bari!” Onklo Ĝaŭ diris por bonvenigo al ni.

“Onklo Ĝaŭ, kie ĝi estas?” demandis mia kuzo.

“Ho, vi ankoraŭ ĝin tenas en zorgo. Ĝi restas en la antaŭa loko.” Onklo Ĝaŭ plenigis sian pipon per tabako kaj ĝin bruligis.

Mia kuzo Erjong kuris orienten laŭ la longa ligna trogo. Mi pensis, ke eble li iris por venigi iun por ludi kune kun ni, tial mi ne sekvis lin. Momenton poste, subite aŭdiĝis klarionado el la orienta domo. Ne melodio de opera kanto, nek iu ario, sed ĉiam malagrabra monotona “va — va —”.

“Onklo Ĝaŭ, kiu trumpetas?” mi demandis.

“Via kuzo.”

“Mia kuzo?” Mi tuj kuris saltante orienten laŭ la longa ligna trogo, trakuris pajlan kabanon kaj venis en la orientan ĉambron.

Ha! Min kaptis rido ĝismorta! Al fosto meze de la ĉambro ligiĝis flava bovo kun akraj kornoj, kiu saltadis kun larĝe malfermitaj okuloj pro timo. Mia kuzo Erjong tamen ankoraŭ klarionadis kun ruĝiĝinta vizaĝo pro fortostreĉo.

“Vi ankoraŭ blovas, vidu kiel ĝi timas!” Mi ne povis kompreni, kial mia kuzo nepre uzis tiun lokon por lerni klarionadon tiel timigante la bovon. Li ignoris min kaj daŭrigis sian energian blovadon.

“Ĉu vi intencas ĝin mortigi per timo?” Mi kaptis la kuzon per mia mano. Mia kuzo Erjong ĉesis kaj diris al mi spiregante: “Mi klarionas ĝuste pro tio ke ĝi timas.”

“Por kio do?”

“Ĝi estas ĵus aĉetita. Matene antaŭhieraŭ, kiam ĝi aŭdis signalon de aŭto sur ŝoseo, ĝi starigis la voston kaj forkuris.”

“Se vi plue ĝin timigas, ĝi ankoraŭ pli deziras forkuri.” mi diris.

“Ne!” Mia kuzo Erjong proksimiĝis al mi, levis sian dekstran manon kaj diris montrante la bovon: “Aŭdinte signalon de aŭto ĝi ekkuris pro timo. Ĝi timas nur pro malofta aŭdo de tio. Se ni ofte aŭdigos tion al ĝi, ĝi kutimiĝos kaj ne plu timos.”

“Pro tio do! Vere lerta estas vi!”

“Mi? Verdire, tio estas logiko simpla, tamen ĝi ne venus en mian kapon, se onklo Ĝaŭ ne ordonis, ke mi prunteprenu klarionon.”

Nokte, mi lernis kune kun mia kuzo Erjong kiel kutime. Apenaŭ fininte la hejman taskon, mi jam volis iri ludi. Mi ĵetis rigardon al mia kuzo kaj vidis, ke li estas skribanta en la taglibro kun mallevita kapo, fermita buŝo kaj firme tenata plumo. Li skribis tiel atente kaj absorbite.

Vere koran admiron mi sentis al mia kuzo Erjong! Ekde nun, mi nepre bone lernos de li!


* kvin garantioj: garantio de manĝaĵo, garantio de vestoj, garantio de loĝejo, garantio de kuraco kaj garantio de postmorta prizorgo al homo senparenca kiu perdis laborkapablon.

Reviviĝo de la Du Interrompitaĵoj Brakoj

LA infano revenis post sesmonata forlaso de la hejmo. La patrino kaj la filino kun emocio interbrakumis sin, kio kortuŝis la vilaĝanojn svarmintajn ĉe enirejo de la vilaĝo. Kiam la kvarjara Ĉunling etendis siajn brakojn por ĉirkaŭpreni la patrinon, tiu ekstreme ĝojis, ke ŝiaj varmaj larmoj senĉese subruliĝis.

La afero okazis en iu tago de septembro, 1973. Jam frue la vilaĝanoj de Dafugang, Ŝandong-provinco, venis ĉi tien por bonvenigi la revenon de la knabino Ĉunling, kiu estis sendita al hospitalo pro interrompo de la du brakoj. Kiam ŝi eliris el la aŭto, oni varme ŝin enbrakigis kaj transdonis de unu persono al alia finfine ĝis ŝia patrino, kiu atendis sian filinon jam longtempe.

Du monatojn post la operacio du brakoj de Ĉunling jam povis leviĝi ĝis la kapo.



Antaŭ ses monatoj, kiam la teknikisto de la produkta brigado Caŭ Janhian, la patro de Ĉunling, funkciigis muelmaŝinon, la knabino ludis apud la maŝino. Neatendite, la knabino piedpremis la rapide turniĝantan transmisilan akson kaj estis envolvita de la rimeno. Ŝiaj brakoj estis tordrompitaĵoj ĉe la humeroj. La disŝirita parto estis tute malneta pro ŝirado kaj iuj el la eltiritaj sangvazoj kaj nervoj eĉ atingis la longecon de 12 cm.

La nudpiedaj kuracistoj de la brigado kaj la komunuma kuracejo tuj donis al ŝi unuan helpon kaj bone konservis ŝiajn du defalintajn brakojn. Informiĝinte pri la akcidento, la gubernia hospitalo tuj ekspedis ambulancan kaj sendis la knabinon por peti kuracadon de la Hospitalo n-ro 89 de Ginan-aj Trupoj de ĈPLA kiu situas pli ol 50 kilometrojn fore.

La partia organizo de la hospitalo donis grandan atenton al tiu afero kaj tuj faris aranĝon por urĝa savo. Post la unua ekzameno, estro de la kirurgia fako Vang Ĉengki diris: “Laŭ la kondiĉo de la hospitalo, pli grandan certecon havas replanto de unu interrompita brako, tamen ni nepre faros ĉion por ke la knabino forlasu nin kun du sanaj brakoj.” Tuj komenciĝis la streĉa savlaboro en la hospitalo.

Por malpezigi la ŝarĝon al la knabino, la kuracistoj decidis replanti la du brakojn samtempe kaj fari la riparadon de interrompitaĵoj nervoj pliposte.

Post purigado de vunditaĵoj surfacoj kaj rekunigo de rompitaĵoj ostoj, oni trovis, ke pro tordo de la maŝino la finoj de iuj rompitaĵoj sangvazoj jam profundigis ĝis akseloj. Tio malfaciligis la operacion.

Ĉefkirurgo Jang Vejhuo kaj liaj helpantoj, kiuj respondis pri la replanto de la maldekstra brako, lerte kaj atenteme serĉis, apartigis kaj kundudris ĉiujn tre maldikajn sangvazojn en malorde implikiĝintaĵoj finoj.

Sur la alia flanko de la operacia stablo, Vang Ĉengki, kiu respondis pri replanto de la dekstra

brako, jam daŭre laboris 8 horojn, kiam li kunkudris la kvaran sangvazon. Tiam lin tre laciĝintan jen kaj jen atakis kapturigo kaj mallaborigo de la okuloj, tamen li ankoraŭ persistadis en la operacio.

Kiam ili fine kunigis la lastan rompitan sangvazon kaj deprenis la arteripinĉilojn, la du palaj brakoj iom post iom ruĝiĝis. Sed, post dek horoj, al la maldekstra brako okazis triafoje ŝvelado pro obstaklo de sangcirkulado, la du antaŭaj estis jam forigitaj.

Sed por la tria fojo la kuracistoj ne sukcesis uzinte kvankam kvar kontraŭrimedojn. Post urĝa interkonsultado, oni konkludis, ke tio estis embolo de vejno. Post forigo de la embolo, fine ĉesis la ŝveliĝo. Tiam jam pasis tridek horoj post la operacio.

Kvankam la du rompitaĵoj brakoj reviviĝis, tamen ili ankoraŭ ne havis senton pro malfunkcio de nervoj. La kuracistoj de la hospitalo jam elpensis multajn projektojn por ripari la rompitaĵojn sur la vunditaĵoj. Post detala diskutado, ili resumis ilin en kvar projektojn, kiujn oni portis al ses hospitaloj de Pekino, Ŝanhajo kaj aliaj lokoj por peti opiniojn ĉe kirurgoj. Samtempe, ili faris eksperimentojn sur ok animaloj kaj akiris iajn spertojn pri nervoriparado.

Post kvar monatoj ekde enhospitaliĝo de Ĉunling, oni komencis la riparadon de rompitaĵoj de ŝia maldekstra brako. Post penado dum ses horoj, Vang Ĉengki kaj Jang Vejhuo fine trovis la ses interrompitaĵojn finojn de la tri ĉefaj nervoj. Tamen, la tri tiom difektitaĵoj nervoj fariĝis ne sufiĉe longaj por anastomozado. Malfacila estis la afero, kiun tamen ili sukcesis venki post granda klopodo.

Post du semajnoj, oni faris alian operacion por ripari la nervojn de la dekstra brako kaj ankaŭ akiris ĝojindan sukceson. Poste la kuracistoj kaj flegistinoj zorgeme faris por ŝi fizioterapion kaj igis ŝin diligente fari ekzercadon de siaj brakoj. Dank' al tio la du brakoj fine reakiris la funkcion.

En septembro de 1973, Ĉunling forlasis la hospitalon.

Nun, ŝi povas levi siajn brakojn ĝis sia kapo kaj reakiris per tiuj sentojn pri varmeco, malvarmeco, moleco kaj malmoleco. Ŝiaj fingroj de la dekstra mano povas preni arakidgrajnon, kaj tiuj de la maldekstra povas preni tablotenis-pilketon. Krome ŝi povas mem manĝi kaj trinki.

En sesmonata kuraciĝo en la hospitalo, flegistinoj, kiuj zorgeme flegis ŝin, faris notojn kun pli

ol 120,000 ĉinaj ideografiaĵoj priskribantaj la tutan disvolviĝon de ŝia kazo. Ili faris ĉion por eviti aperon de kuŝskaro, ĉiufoje dum ŝanĝo de medikamento, ili frotis kaj masaĝis al ŝi la dorson kaj gluteon.

Kamaradoj de la kuirejo kaj nutraĵoficejo ofte iris al Ĉunling por koni ŝian vivkutimon kaj manĝigi ŝin per plej plaĉa manĝaĵo. En la komenco de printempo, kiam Ĉunling volis manĝi tomaton, la nutraĵisto ne hezitis iri 15 kilometrojn foren por havigi ĝin al ŝi.

La patro de Ĉunling de komence jam venis akompani kaj prizorgi ŝin en la hospitalo. Pro tio perditaj laborpoentoj por li kiel teknikisto estis aldonitaj de la produkta brigado.

La pagoj pri kuracado, medikamentoj, manĝaĵoj kaj hospitalaj pagoj de Ĉunling estis tute liberigitaj.

Ĝaŭ Lanjing, la patrino de Ĉunling, emocie diris al vizitantaj ĵurnalistoj: "Grandaj estas la ĉielo kaj la tero, sed ne tiom kiom la favoro de Prezidanto Maŭ. Kaj estas miloj kaj dekmiloj da bonaĵoj, sed ne estas pli bona ol la nova socialisma Ĉinio!"

Lavi siajn manojn.





Amikeco Neforgesebla

VU VENPU

— Notoj pri prezentada vojaĝo de la Centra Filharmonia Trupo en Japanio

JE mencio pri sia prezenta vojaĝo en Japanio, la membroj de la Centra Filharmonia Trupo de Ĉinio tuj ekscitiĝas kaj ili povas rakonti al vi multajn kortuŝajn historiojn pri la amikeco inter Ĉinio kaj Japanio.

MILJARA SONORILEGO DONAS NOVAN MUZIKON

Ĉinio kaj Japanio estas dividitaj nur per rubando de akvo. Oni diras, ke en la dinastioj Kin kaj Han de Ĉinio antaŭ du mil jaroj, amikaj interligoj jam komenciĝis inter la popoloj de la du landoj. Nun mi unue rakontu al vi la historion pri miljara sonorilego.

En oktobro de 1974, kiam la Centra Filharmonia Trupo de Ĉinio faris prezentan vojaĝon en Japanio,

ĝi venis al la japana antikva urbo Nara. En tiu urbo konserviĝas riĉaj memoraĵoj pri la amikaj rilatoj inter la ĉina kaj japana popoloj en antikveco. La bronza sonorilego en la Orienta Templo de Nara estas unu el ili. Kaj por komenci novan paĝon de tiu malnova amikeco, Nara starigis amikan rilaton kun la ĉina urbo Hi-an en 1974. Antaŭ 1,200 jaroj, la ĉina bonzo Gianĝen de Tang-dinastio vojaĝis al Japanio kaj loĝadis en la Orienta Templo. Li konigis al la japana popolo la teknikojn de konstruado, skulptado, medicino kaj farmacio kaj per tio faris kontribuon en kulturado de amikeco inter la ĉina kaj japana popoloj. Kiam la artistoj de la Centra Filharmonia Trupo vizitis la Orientan Templon de Nara, ili vidis nigre verdan sonorilegon el bronzo kun alteco de 3 metroj, pendantan en la sonorila turo. Tiu sonorilego estis fandita laŭ modelo de Tang-dinastio kaj nomita Granda Sono-



Esti varme akceptataj de la laboristoj de iu horloĝfabriko en Tokio.



Prezentado en Japanio

rilego. Ĝi ne sonoras en ordinaraj tagoj kaj ĝia potenca sono disaŭdiĝas nur en la antaŭnovjara vespero. Japana amiko, kiu akompanis la trupanojn en la vizito, diris ke la amikeco inter Japanio kaj Ĉinio ricevis disvolviĝon post la starigo de diplomatia rilato kaj petis la membrojn frapi la sonorilegon, kiu simbolas pacon kaj amikecon inter Japanio kaj Ĉinio. Li donis la ŝnuron de la fra-pilo en la manon de la trupestro Lin Lijun kaj post ekfrapo potenca sono longe ŝvebadis super la urbo.

Aŭdinte la profundan potencon muzikon de la antikva bronza sonorilego, la solo-kantisto Hu Songhua pleniĝis de poezia emocio kaj verkis jenan poemon post reveno al la hotelo:

*En Nara kantas la sonorilego,
kaj floras la sakuroj en Pekino.
Malnova amikeco renoviĝas
kaj ligas nin trans la mar-malproksimo.
La du popoloj bone kunlaboru
por fari kontribuojn jam sen fino.*

ĜOJA RENKONTIĜO

Dum sia prezenta vojaĝo, la Centra Filharmonia Trupo intervidiĝis kun multaj malnovaj amikoj kaj ankaŭ akiris multajn novajn amikojn. Ĝojajn horojn ili kune pasigis en amika interparolado kaj intimaj sentoj.

Iutage, Sadamacu Tooru kaj lia edzino kaj kelkaj aliaj japanaj amikoj de la japana Macujama Baleda Trupo venis post la kulison kun kesto da mandarinoj kaj multaj memorigaj donacoj por vidi la ĉinajn amikojn. Je la kara horo de renkontiĝo, Sadamacu Tooru diris kun larmeroj en la okuloj al Ĝaŭ Fang kaj aliaj ĉinaj amikoj: “Finfine ni renkontiĝis en Japanio!” Tion dirante li elpoŝigis tukon, sur kiu skribiĝis: “Vivu la batala amikeco inter la popoloj de Ĉinio kaj Japanio!”

Kiam Ĝaŭ Fang vidis la tukon, tuj aperis en lia kapo sceno antaŭ dek jaroj. Tiam la Macujama Baleda Trupo vizitis Ĉinion kaj faris prezentadon en diversaj lokoj de Ĉinio en kunlaboro de

la Centra Filharmonia Trupo. Dum la kunvivado, profunda amikeco kreskis inter Ĝaŭ Fang kaj Sadamacu Tooru. Post la fino de la prezentado, kiam Sadamacu Tooru estis forveturonta al sia hejmlando, Ĝaŭ Fang kaj aliaj tri ĉinoj pretigis la tukon kun la emociaj vortoj kaj siaj nomoj kaj ĝin donacis al li.

En la pasintaj dek ŝtormaj jaroj, Sadamacu Tooru ĉiam gardis kiel trezoron la tukon de profunda amikeco. Li pendigis la tukon sur muro kaj kiam li vidis la elegantan surskribaĵon, li tuj ekmemoris la tagojn en kiuj li faris prezentadon kune kun la amikoj de la Centra Filharmonia Trupo de Ĉinio. “En la socialisma Ĉinio ekzistas la plej altvalora amikeco en la mondo!” Sadamacu Tooru ofte tiel pensis.

La profunda amikeco de Sadamacu Tooru forte kortuŝis la ĉinajn artistojn. Rememorante la batalan amikecon kiun li spertis dum kunlaboro kun la Macujama Baleda Trupo, artisto Ĝang Gian tiel emociiĝis ke li verkis jenajn versojn:

*Jangzi-rivero sin etendas kiel ĉielarko,
kaj Fuĵi-monto belas kiel neĝlotusa floro.
Spite al la akvorubando inter ni kuŝanta,
la ĉinoj kaj l' japanoj staras kune kor' kun koro.*

*Forpasis jam jardek' sed daŭras nia amikeco,
la renkontiĝ' plenigas nin per ĝojo jen hodiaŭ.
La granda kant' de amikec' — komuna verko
nia-
potence tondru en longdaŭro tra l' generacioj.*

REFLORADO DE LA TRADICIA AMIKECO

Dum sia vizitado de pli ol 20 tagoj en Japanio, la Centra Filharmonia Trupo okazigis koncertojn en Tokio, Jokohama, Osaka kaj aliaj 15 urboj. Ĝi prezentis revoluciajn muzikajn verkojn kreitajn en la Granda Proleta Kultura Revolucio de Ĉinio kaj ĉinajn eminentajn antikvajn muzikajn verkojn kaj popolajn kantojn kaj ariojn, kiuj estis varme aklamitaj de japanaj amikoj.

Kiam la filharmonia trupo faris prezentadon en Hiroŝima, laboristoj de petrola entrepreno de Imaguĉi-gubernio speciale venis por aŭskulti la fortepianan konĉerton *La Flava Rivero*. Post la prezentado, iu karboministo el Kjuŝu diris emocie: “La ludita muziko estas forta, klara kaj harmonia, kiu spegulas la antaŭenmarŝon de la ĉina popolo. Vivu la venko de la granda Maŭzedongpenso en la afero de muziko!” Por memorigi la 70-an datrevenon de la studo de Lusin en Japanio, la



Estro de la Centra Filharmonia Trupo Lin Lijun manpremas kun Macujama Mikiko en la Macujama Baleda Trupo de Japanio.

Centra Filharmonia Trupo okazigis Pianan Koncerton de Jin Ĉengĝong en Sendaj. Je fino de la prezentado de la programo, Jin Ĉengĝong trifoje ludis aldone pro aplaŭdado de la spektantoj, sed la lastaj ankoraŭ longe ne volis forlasi la teatron. Iu el ili diris premante la manon de Jin: “Kortuŝega, tre forta kaj tre kuraĝiga.” En alia koncerto, aŭskultinte parton de la simfonio *Sagaca Kopto de Tigra Monto*, japana komponisto Dan Ikuma diris al direktanto de la filharmonia trupo Li Delun: “Vere multas malfaciloj en kombino de nacia muziko kun la okcidenta. Sed vi tre bone solvis la problemon. La muziko ludita de vi estas en unika ĉina stilo kaj estas tute nova kaj en formo kaj en arta tekniko.”

Kiam la filharmonia trupo faris prezentadon en diversaj lokoj de Japanio, la prezentejoj ĉiam estis plenplenaj de entuziasmaj japanaj spektantoj kaj la haloj ofte ne havis sufiĉan spacon por enteni ĉiujn interesiĝintojn. Por kontentigi la postulon de la japanaj amasoj, la Japana Radio-Asocio dekofoje brodkastis la prezentadojn per la radia kaj televida reto. Nemalmultaj japanaj amikoj skribis al la asocio, ke oni ripetu tiujn programerojn kaj farigu gramofonajn diskojn de ili. La ŝato kaj admiro de la japana popolo al la ĉina revolucia muziko multe kuraĝigis la laborantojn de la Centra Filharmonia Trupo.

LERNI ĈINAJN MODELAJN OPEROJN

Neforgeseblan impreson Onodera lasis al la membroj de la Centra Filharmonia Trupo per sia lernado de parto de la revolucia simfonio *Sagaca Kopto de Tigra Monto*.

Post fino de sia prezentado en Osaka, la aktoroj de la Centra Filharmonia Trupo veturis per ŝipo al Takamacu. Vespere, kiam Hu Songhua iris promeni sur la ferdeko, iu japana junulo venis renkonte al li. La junulo estis interpretisto Onodera. Li diris al Hu Songhua: “Ĉu vi estas libera? Mi lernas kanti la pecon ‘Ŝanĝiĝos Certe l’ Landa Fizionomio’, kiun vi kantis, kaj volas peti vin aŭskulti mian provon, ĉu bone?” Hu Songhua tuj diris ĝoje: “Bone!”

Onodera orfiĝis en sia infaneco. Tage li laboras en restoracio kaj vespere lernas la ĉinan lingvon en vespera kurso. En 1973, kiam la Delegacio de la Ĉina-Japana Amikeca Asocio por Vizito al Japanio venis al Japanio, li laboris por ĝi kaj lernis

la kanton “Je Sentimeco de Leono Plenas Mia Koro” el la revolucia pekina opero *Ruĝa Signal-lanterno*, kantitan de Haŭ Liang. Ĉifoje, aŭskultinte la kantadon de Hu Songhua, li estis profunde kortuŝita de la sentima revolucia spirito de la heroo Jang Zijong en la opero *Sagaca Kopto de Tigra Monto*, kaj precipe la kanto “Ŝanĝiĝos Certe l’ Landa Fizionomio” tiel tuŝis lian koron, ke li eklernis ĝin. Starante sur la pruo, ili laŭte kantadis vizaĝe al la muĝanta maro en la krepusko, kaj la kanto flugis malproksimen kvazaŭ ruliĝantaj maraj ondegoj.

Sukcese finiĝis la prezentada vojaĝo de la Centra Filharmonia Trupo. En adiaŭa amuza kunveno okazigita antaŭ ĝia reveno al la patrolando, Onodera emocie kaj sukcese kantis la pecon “Ŝanĝiĝos Certe l’ Landa Fizionomio”. Li kantis kun brilaj okuloj, forta emocio kaj plena seriozeco. Ĉiuj ĉeestantaj ĉinaj kaj japanaj amikoj varme aplaŭdis lian kantadon.

LA KANTO DE AMIKECO SONU DE GENERACIO AL GENERACIO

Hodiaŭ la membroj de la Centra Filharmonia Trupo ankoraŭ bone memoras la solenan kunvenon de amikeco apud Biva-lago.

La bela Biva-lago kun lazuraj ondetoj prezentis refreŝigan pejzaĝon. Sur ĝia bordo, pli ol 300 diversrondaj amikoj kaj geknaboj en festaj kostumoj de la urbo Oocu varme bonvenigis la ĉinajn artajn delegitojn. Sur tapiŝo-simila razeno, japanaj virinoj ludis antikvaj kordmuzikilojn dum viroj blovis japanajn flutojn. Oni kaj kantis kaj dancis en atmosfero saturita de varma amikeco.

Kelkaj knabinoj deŝiris paperfoliojn el sia taglibro kaj komencis skribi kaj pentri. Baldaŭ poste la paperpecetoj jam venis en la manojn de la artistoj de la filharmonia trupo. La lastaj ekriĝardis kaj trovis sur la paperpecoj portretojn kun karakterizaj trajtoj apud kiuj skribiĝis la nomoj kaj adresoj de la knabinoj. La membroj de la trupo tuj komprenis ilian deziron, ke la ĉinaj amikoj neniam ilin forgesu.

Ho, la semoj de amikeco inter Ĉinio kaj Japanio estas jam dissemataj en la korojn de la juna generacio. En la eventoplenaj jaroj de la estonteco, certe ili alportos brilajn florojn de amikeco.



Ĥalĥazoj

ZONG MIN

ĤALĤAZ-NACIO nombras pli ol 70,000 membrojn, en kiuj 78% koncentre loĝas en Kezilesu-a Ĥalĥaza Aŭtonoma Subregiono ĉe la sudokcidenta parto de la Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono. Kaj ankaŭ en la gubernioj Tekes, Ĝaŭsu kaj Emin en la norda parto de Hingiang kaj la gubernio Fuju de Hejlonggiang-provinco loĝas malmultaj ĥalĥazoj.

Ĥalĥazo estas nomo nomita de tiu nacio mem, kiu aperis jam en niaj literaturoj antaŭ du mil jaroj. Tiu nacio estis nomata “gekun”, “giansun” kaj “ĉigu” en la periodo de Han- ĝis Suj-dinastioj, “ĝiasi” en Tang-dinastio kaj “bulute” en King-dinastio. Delonge, ĥalĥazoj havis intiman rilaton en vivo, kulturo kaj lingvo, kun han-oj, ujguroj, kazaĥoj, mongoloj kaj taĝikoj. Precipe en la lasta jarcento ĥalĥazoj kaj aliaj nacioj batalis ŝultro ĉe ŝultro kontraŭ imperiismo, feŭdismo kaj burokrata kapitalismo, donis fortan baton al la agresado de cara Rusio kaj brita imperiismo kaj al la reacia regado de Kuomintango kaj faris

Ĥalĥazo (dekstre) kaj kazaĥoj, studentoj de la Centra Instituto por Nacimalplimulto en Pekino



siajn kontribuojn en defendo de integreco de la patrolanda teritorio kaj la nacia unuiĝo.

Ĥalĥazoj okupas sin ĉefe pri brutobredado. Nur malmultaj el ili entreprenas agrikulturan produktadon en la lokoj proksime de agrikulturaj regionoj. El la lokoj kie vivis ĥalĥazoj de generacioj en la regionoj Tianŝan-montaro kaj Pamiro, 70% estas kun abunda akvo kaj vasta paŝtejo, tamen, sub la kruela feŭda ekspluatado kaj nacia subpremado, tieaj popolanoj vivis tre mizeran vivon. Ekzemple Ulugĉat-gubernio de Kezilesu-a Ĥalĥaza Aŭtonoma Subregiono en 1949 post la Liberiĝo havis nur 31,000 brutojn, t.e. ĉiu loĝanto po 2 malgrandajn kaj malpli ol 1 grandan. Dum la longa tempo de feŭda regado tre akriĝis la klasa polusiĝo de ĥalĥazoj kaj ekstreme diferencis ilia riĉeco. Ni prenu Kezilesu-an Ĥalĥazan Aŭtonoman Subregionon kiel ekzemplon. En la jaro 1949 post la Liberiĝo, la malriĉaj familioj, kiuj havis nenian aŭ malmultajn brutojn, okupis 70% de ĉiuj familioj de tiu regiono, sed la familioj de paŝtistmastroj, kiuj konsistigis nur 10% de ĉiuj familioj, okupis 70% de la totala nombro de brutoj kaj grandparton de la brutbredejoj kaj herbejoj de la tuta regiono. Ĥalĥazoj kutime nomadas en unuo nomata “ajinle”, kiu konsistas el 5-10 samsangaj familioj en la tribo. Ĉar la posedanta kvanto de produktaj rimedoj inter la ĥalĥazoj estis neegala, la malriĉaj paŝtistoj devis sin dependi al la mastroj. Interne de “ajinle” la malriĉaj paŝtistoj, kiuj perdis brutaron, laboris kiel dungitoj ĉe la mastroj kaj ĉiujare ili ricevis nur tri ŝafojn kiel salajron. Iuj el ili paŝtis brutojn anstataŭe por mastroj kaj ricevis nenian alian rekompencan escepte de ŝaflano kaj lakto.

En oktobro de 1949, Hingiang estis liberigita. Sub la saĝa gvido de la Partio kaj Prezidanto Maŭ, en la paŝta kaj agrikultura regionoj ĥalĥazoj plenumis sinsekve demokratian kaj socialisman reformojn kaj ekiris sur la socialisman vojon. Ili sin apogas sur la propraj fortoj kaj peneme lukadas, tiel ke la diversaj aferoj disvolviĝas en prospero.

Frue en la komenco post la Liberiĝo, en tiu regiono jam stariĝis la popola reĝimo. En 1954, sur la bazo de venko de la demokratia reformo kaj laŭ la naciaj politikoj de la Partio, en la gubernioj Atuŝ, Ulugĉat, Akĉi, Akto k.a. de la norda Hingiang, kie koncentre loĝas ĥalĥazoj, fondiĝis Kezile-su-a Ĥalĥaza Aŭtonoma Subregiono. Por ke la aŭtonoma organo povu plene plenumi sian aŭtonoman rajton, la Partio kaj popola registaro aktive kulturis nacimalplimultajn kadrojn. Post la hardado de politikaj movadoj kaj la Granda Proleta Kultura Revolucio, nun la nombro de kadroj de ĥalĥazoj kaj aliaj nacimalplimultoj de tiu aŭtonoma subregiono pliiĝis je 5-oblo kompare kun tiu de 1954. En la revoluciaj komitatoj de la subregiono, gubernioj kaj komunumoj nacimalplimultaj kadroj laboras kiel ĉefaj gvidantoj.

Antaŭ la Liberiĝo, ĥalĥazoj loĝis apud akvo kaj herbejo kaj paŝtis en valoj inter neĝmontoj. Pro la malfacila trafikado kaj minaco de epidemioj, la popolanoj baraktis en malsato kaj malsano. Pro tio, post la Liberiĝo, ĥalĥazoj decidis konduki la socialisman revolucion ĝis la fino. La amasaj movadoj de lerno de Daking en industrio kaj de lerno de Daĝaj en agrikulturo akcelis rapidan disvolviĝon de la konstruado en la ĥalĥaza regiono. En la jaro 1973, la nombro de brutoj plimultiĝis je unu-oblo ol tiu de la komenco de la fondiĝo de la aŭtonoma subregiono, ankaŭ la totala produktokvanto de greno plimultiĝis evidente kaj kotono je pli ol 2-oblo. La totala produktov valoro de industrio en 1973 kreskis je pli ol 89% kompare kun tiu de 1964, la jaro antaŭ la Granda Proleta Kultura Revolucio. Nun en tiu loko stariĝis minejoj kaj fabrikoj de karbo, fero, maŝinoj, cemento, elektro, fandado de nigraj metaloj kaj prilaborado de manĝaĵoj kaj pelto. La laboristoj de la unua generacio de ĥalĥazoj kreskas sane.

Ĥalĥazoj estas unu el la nacioj havantaj elstaran kulturan tradicion kun aparta stilo en siaj literaturo kaj arto. Kaj ĝiaj kreaĵoj de popolaj literaturo kaj arto estas abundaj, la fama eposo *Manas* eĉ cirkulas ĝis nun inter la popolanoj. "Kumuz" estas speciala plukmuzikilo de ĥalĥazoj. Hodiaŭ, plukante tiun muzikilon la ĥalĥazoj kantas ĝoje sur vasta stepo:

*Mi plukas mian kumuz kun prikanto
Al nia kara granda patrolando.
Linion fundamentan de l' Partio en la koro
Tenu, ni havos forton unuiĝe en batalo.
Kaj Prezidanto Maŭ nin gvidas sur la vasta vojo
Socialisma, ho, antaŭen al brilega foro.*



NOVA FRUKTO DE SCIENCA ESPLORO AL KINGHAJ-TIBETA ALTEBENAĴO

En 1974, sciencaj laborantoj de nia lando daŭre faris grandskalan sintezan sciencon esploradon al Kinghaj-Tibeta Altebenaĵo. En ĝi partoprenis laborantoj de pli ol 30 sciencaj branĉoj kiel geologio, glacirivero, zoologio, botaniko, agrikulturo, arbaro, brutobredado, akvomastromado, altmonta biologio k.a. el koncernaj scienc-esploraj institutoj kaj altaj lernejoj. Ili faris esploradon en regiono oriente de Ŝkaze, ĉirkaŭaĵo de Ĝolmo-lungma, Meto kaj rivervalo de la granda kurbiĝo de Jalucangpo. Ili kolektis ne nur materialojn de bazaj sciencoj, studis teoriajn problemojn pri altebenaĵa scienco, sed ankaŭ faris fakan esploron laŭ la bezonoj por disvolvi lokajn industrion kaj agrikulturon. Ili kolektis relative sistemajn sciencajn materialojn pri la hidrologia karaktero, geologia strukturo, topografo de la rivervalo, arbaraj riĉfontoj, natura geologio, grundo, flaŭro kaj biologio kaj trovis multe da novaj specioj de animaloj kaj vegetaloj. Ili ankaŭ observis kaj registris la staton de degelado kaj movo de glacirivero, esploris la leĝojn pri formiĝo, disvolviĝo kaj movado de glaciriveroj sur la nomita altebenaĵo kaj per tio akumulis sciencajn materialojn por preventi katastrofojn kaŭzitajn de glacio kaj neĝo kaj utiligi la riĉfonton de ilia fandakvo. Ili observis la riĉajn termofontojn de la altebenaĵo kaj kolektis iliajn specimenojn, liverante per tio materialojn por uzi subteran varmon. Krome en esploro de minfontoj ili liveris spurojn de mineraloj kaj akumulis materialojn por esplori geologian disvolviĝon kaj formiĝon de mineraloj sur la altebenaĵo. La esploro pri arbaro, agrikulturo, brutobredado kaj akvomastromado plie rekte helpas al la nunaj produktado kaj konstruado de la Tibeta Aŭtonoma Regiono.

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO
P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

Ĝenerala distribuanto: Guozi Shudian (Centro de Ĉinaj
Eldonaĵoj), P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

N-ro 4 (201) 1975

Ĉefa Enhavo

Venke marŝu antaŭen laŭ la revolucia linio de Prezidanto Maŭ	1
Prospera disvolviĝo de agrikultura mekanikigo en la nova Ĉinio	7
Nova paĝo pri sinapogo sur la propraj fortoj	14
Agrikultura mekanikigo de ĝuang-a montregiono	19
Nia "maljuna ŝipestro"	22
Bredi serpentkapajn fiŝojn	24
Pri la infana filmo "Trembrilanta Ruĝa Stelo"	27
Kiel mi ludis la rolon de Dongzi	31
Mia kuzo Erjong (infana literaturaĵo)	33
Reviviĝo de la du interrompitaj brakoj	36
Amikeco neforgesebla	38
Ĥaĥhazoj	42







Du-an-gubernio de Guanghi situas en ŝtonoza loko, kaj ĝiaj pli ol 46,660 hektaroj da agro plejparte dislokiĝas en pli ol 20,000 ŝtonejoj kaldronfundoformaj, facile atakataj de inundo kaj trosekeco. Sed, la diversnaciecaj popoloj de la Du-an-a Jaŭnacia Aŭtonoma Gubernio aktive ebenigas montojn por konstrui kampojn, ekspluatas kaj utiligas subteran akvon kaj starigis subterajn akvokonservejojn kaj pumpstaciojn. Dank' al tio, ili ŝanĝis la malnovan fizionomion kaj akcelis disvolviĝon de tiea agrikultura produkto. De la jaro 1968, Du-an-gubernio estas pli ol memsufiĉa en grenprovizo, kaj la vivo de la lokanoj pliboniĝis.

Nova Fizionomio de Du-an

Hidrogeologiaj laborantoj en kunlaboro de komunumanoj faras esploron en subtera kavo por utiligi subteran akvon en irigaciado.




Linlang-a hidroeletrejo, unu el la 14 malgrandaj hidroelektraj stacioj konstruitaj de Du-an dum la lastaj kelkaj jaroj



Kanalo serpentina ĉirkaŭ montoj de Gaŭling-komunumo




Malpezindustrio de






Ŝtuparaj kampoj konstruitaj
sur ŝtonoza montdeklivo




Paŝti kaprojn
sur montdeklivo

Ŝenjang en Disvolviĝo

La produktokvanto de la Ŝenjang-a Kudromaŝina Fabriko en 1974 triobbligis tiun en 1969. Jen ĝia ŝelolaka linio.



La Ŝenjang-a Fabriko de Ĉiutage Bezonataj Kemiaĵoj kritikis la absurdajn "meti profiton en komandon", kaj klopodas produkti koldkremon kun malgranda profito tamen bonvenigatan de vasta laboranta amaso.







persistante pri la principo "sendependeco, memdecido kaj
 napogo sur propraj fortoj", la Ŝenjang-a Kemifibra Fabriko
 konstruita en mallonga tempo nun produktas mallongan poli-
 teran fibron.




La Ŝenjang-a Aluminiĵo-fabriko Gongnong starigis unu pro-
 duktan linion per premkaldronoj, kiu multe levis kvanton kaj
 kvaliton de la produktaĵoj.

La laboristoj kaj oficistoj de la Ŝenjang-a Lanŝpina Fabriko
 kuraĝe reformis produktan teknologion kaj produktis tutlanan
 delikatan ŝpinitaĵon per lano de nia lando. Jen la fabriko
 produktas lanbendon.




Naturgaskampoj estas konstruitaj unu post alia en
 la vasta Siĉuan-a Baseno.


Gasotranssendejo



Siĉuan-aj Naturgaskampoj en Konstruado





Sulfura preparejo per sulfuro el natura gaso




La 1815-a virina putobora taĉmento laboras en putejo.

Termoelektra laborejo funkciigata per natura gaso



Jingang-kanalo

Sub la direktado de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, la popolanoj de la gubernioj Fulu, Pingŝan kaj Juanŝi de Hebej-provinco unuiĝis en batalado kaj konstruis per sentima heroeco grandan kanalon Jingang en 1974 ĉe orienta piedo de Tajhang-montaro post kvarjara penado. La kanalo cent kilometrojn longa povas irigacii 29,100 hektarojn da agro, per tio ĝi ludas gravan rolon en transŝanĝo de trosekeco de la tri gubernioj.



Dank' al la kanalo, la pomua produktokvanto de tritiko de Fulu kreskis de 135.5 kg. ĝis 220.5 kg. Jen la komunumanoj de Guĉeng-komunumo irigacias kotonajn kampojn per la kanala akvo.


Per la fakto de konstruo de la kanalo ili kritikis la ideismon de Lin Biaŭ kaj Konfucio ke "superaj estas saĝaj kaj malsuperaj plebaj".




Bori tunelon




Jen estas unu el la plej grandaj ŝlosilaj konstruaĵoj de la kanalo, tra kiu la akvo fluas al kampoj en du linioj supera kaj malsupera.





Sekretario Goŭ Zengfu (maldekstre) kaj vicsekretario Du Jingjie de la partia komitato de Fulu-gubernio kune kun amasoj transportas ŝtonojn.



Akvedukto de la kanalo

Kulturi Studentojn Minoritatajn

Nia Junnan-provinco havas ok altlernejojn, kiuj nun kulturaj laboristajn, kamparanajn kaj soldatajn studentojn el ĝiaj 21 nacimalplimultoj. Post la Liberiĝo, sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio, la minoritata edukado rapide disvolviĝas kaj la studentoj grandnombre varbitaj el minoritatoj nun studas respektive en fakultatoj de politiko, historio, fiziko, matematiko, kemio, medicino kaj arto, kiuj fariĝos kapablaj laborantoj de socialismaj revolucio kaj konstruado por minoritataj regionoj.

Diversnaciaj studentoj de la Junnan-a Instituto por Nacimalplimultoj



Va-nacia instruisto Ĝaŭ Fuhe (la unua de dekstre) helpas studentojn en lernado.




Minoritataj studentinoj de la fizika fakultato de la Kunming-a Instruista Instituto laboras en fabriko funkciigata de la instituto mem.



La Junnan-a Instituto por Nacimallimultoj ofte sendas siajn studentojn al fabrikoj kaj kamparo por ke ili praktiku tie sian lernitan teorion.





Kokos-arbaro ĉe la Suda Ĉina Maro

Sur Hajnan-insulo de nia Guangdong-provinco, kreskas multspecaj plantaĵoj tropikaj kaj subtropikaj, el kiuj populara estas kokosarbo. Dank' al bona zorgado de komunumanoj, la kokosarboj rapide kreskas kaj ilia produktokvanto multiĝas jaron post jaro. La tuta kokosarbo estas uzbla en industrio. Krome la kokoso servas kiel materialo por diversaj frandaĵoj, kaj ĝia ŝelo gravurita estas delikata metiartaĵo.



